



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

La Kongreso de Murcia

Jen la tero de l' Segura!



Kajeroj el la Sudo!

Diru patata!

La fosiloj

Antaŭ multaj jarcentoj ia franca reĝo venigis tri laboristojn kaj diris al ili: Gravaj premioj mi donos al tiu, kiu fosos plej longan sulkon!

La du unuaj laboristoj komencis disputadi pri la meritoj de siaj fosiloj: Bona fosilo devas esti longa, diris unu. Ĝi devas esti larĝa, diris la alia.

Dum ili disputadis, la tria per pli-malpli bona fosilo fosis sian sulkon kaj gajnis la premion.

Kajeroj _____ _____ el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Martín Bustín Benito.**

*Apartado de Correos 4143
E03080 ALICANTE (Hispanio)*

Secretario: **Jesuo de las Heras Jiménez,**

*Apartado de Correos 4461
E30080 MURCIA (Hispanio)*

Faras la Kajeron:

Redaktoro: **Jesús de las Heras Jiménez,**
Provkorektantoj: **José Pina Tuells kaj Julio
Tarín Cortes,**
Administra laboro: **Juan Antonio Cabezos
Martínez.**

Kasisto: **José María Bernabeu Franco**

*Gral. Primo de Rivera, 8
E-03369 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).*

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la n° 28.09.722.429

en libreta de Caja Postal. Oficina postal 0412. Sen aldona kosto.

Kovrilo:

Enhavo:

Redaktore:	3
Letero el Rusio	4
Eseo monatotria: <i>Gitaro</i>	5
Muziko: <i>Solene kantis Solo</i>	7
Debatindaĵoj: <i>K.F.D.</i>	8
Reagoj: <i>Kastilia Lingvo</i>	10
<i>Kiel indiki la prononcon de la hispana litero II?</i>	11
Lingve parolante: <i>La esperantistigo de México</i>	13
Etnismo: <i>Eŭropo seneŭropana</i>	15
LA 55ª KONGRESO HISPANA DE ESPERANTO	16
La tajforegno de Murcia,	39
La resolución de Praga	42

*Pri la enhavo de
la artikoloj
respondecu la
aŭtoroj mem, ne la
redakcio.*

*Ni ne korespondos pri nepetitaĵ
artikoloj. Tamen, ni klopodos
publiki ĉiun artikolon kies enhavo
estas interesa kaj ne mistraktas iun
ajn personon.*

Redaktore:



Post la dua murcia kongreso..., kaj plu.

Kajeroj el la Sudo estis en la plej granda okazo esperantista en nia srojlo antaŭ dekoj da jaroj: kongreso hispana. Aŭ kvazaŭ hispana, konsiderante kiom da hispanoj ne venis, ĉar ili okupiĝis ekster nia kunigo. Estas domaĝo, ke internaciaj esperantaj eventoj okazas preskaŭ samtempe nian Okazon, kaj tial tiom malmulte da geesperantistoj povis veni. Sed, kompreneble, la plej bonaj venis!

Kajeroj el la Sudo ĉeestis la kongreson tiele, ke antaŭ la fino de la kongreso ĉiu kongresano havis sian kopion de nia *Kongresa eldono* de la numero de julio. Kelkajn grumblojn mi aŭdis pri la kvalito kaj akurateco de nia magazino, sed tio estis okazo por invito al samideanoj helpi plibonigi la revuon. Kaj tio funkciis, certe. Tiurilate mi volas diri unufoje kaj por ĉiam, ke *Kajeroj el la Sudo* havas provkorektanton —du provkorektantojn ĉifoje—, kiuj ankaŭ estas lingvaj kontrolistoj; sed la **RESPONDECO DE LA MAGAZINO**, rilate al lingvo uzata kaj rilate al ĉio, kio ne estas strikte la persona opinio de artikolisto, **APARTENAS SOLE ALLA REDAKTORO**. La kontrolistoj proponas ŝanĝojn tiel bonaj kiel iliaj konoj —egaj—, sed la redaktoro —tio estas, MI— sekvas iliajn bonajn konsilojn **AŬ NE**, kaj tio estas mia ekskluziva rajto, ĉar mi estas la redaktoro. Vere, *Kajeroj el la Sudo* ne estas privata magazino, sed la organo de faka asocio esperanta; sed dum mi estas komisiito por redakti la magazinon nome de HALE, mi difinas la magazinan politikon kaj elektos la artikolojn publikigotajn kaj la lingvo kaj stilo

uzata, sen malrispekti la originalan lingvon uzatan en la artikoloj, kiel niaj artikolisto povas atesti. Mi diras tion, por ke estu klara simpla afero: la provkorektisto(j) ne respondecas eĉ de la stilo aŭ lingvo (ĉu erara ĉu senerara) de la magazino. Tio estas sole mia afero. Eble tiuj, kiuj ne antaŭe redaktis magazinon ne konscias pri tuta la afero, sed la finaj decidoj pri la publikigo estas —kaj devas esti ĉiam— afero apartenanta sole al la redaktoro. Tial, se vi ne konsentas pri io ajn de *Kajeroj el la Sudo*, vi ne rajtas moki aŭ kritiki Sr^o Pinan aŭ Tarin. Bonvolu kritiki aŭ moki la veran respondeculon de la tuta afero. Estas vere, ke mi ne povus fari ĉi tiun magazinon sen la sindonema helpo de miaj amikoj; sed tio signifas, ke ni partas la laboro, tamen ne la respondeco. Se *Kajeroj el la Sudo* estas fuŝaĵo, certe estas nur unu fuŝulo, kiu ne ĉiam aŭdas la bonajn konsilojn donitajn al mi. Kial mi aŭdas aŭ ne, tio estas nur mia afero kaj de tiuj kiuj metis min je ĉi tia tasko kaj povus demeti ĝin el miaj manoj. Ĝis ili faros tion, mi restas la sola respondeculo.

Amikece kaj kamaradece,

Jesuo

Letero el Rusio

NOTO.- Ĉi-foje ne estas informo de la Prezidanto, ĉar Kamarado Martín Bustín Benito sennaciece trairis Eŭropon dum kvar monatoj kaj duono. Li kolektis esperton kaj informon, kiun li tradonis al ni ĉi-lege:

Raporto pri la kunveno de la L.E.A. Komitato okazinta la jaŭdon 18^{an} de julio de 1996 en Sankta Petersburgo dum la SAT-Kongreso:

Kamarado BUSTÍN, prezidanto de HALE, klarigis la nunan situacion; danke al liaj klopodoj la asocio pli sendependiĝas. La bulteno *Kajeroj el la Sudo* havas novan redaktoron je la nomo de Jesuo de las Heras Jiménez. Inter decembro 1988 kaj marto 1996 la bulteno aperis regule kaj montris apartan karakteron per riĉa literatura stilo.

La ĉcestantaro dankis al la kamaradoj **Antonio Marco Botella** kaj **Miguel Fernández Martín** pro la 29 seninterrompaj numeroj kiuj estas grava kontribuo al la maldekstra esperantistaro kaj deziras, same kiel ili humile skribis en la n^o 29, sukeceson en al dua epoko de *Kajeroj!*

La kamaradoj **André Sadier** kaj **André Legros** ĉcestis por SAT-AMIKARO. Reeldonoj de vortaro Esperanto-Franca kaj de la Poŝvortaro. La franclingva monata gazetarservo estas sendita al pli ol 200 organizoj, radioj, gazetoj, asocioj, ktp. La asocio monhelpis la esperantistajn strikantojn

de la decembra socia lukto, Radio-Esperanton kaj SATon. La gazeto aperas regule kaj tuta numero estas dediĉita por la asocia

kongresa raporto. La venonta kongreso okazos en LIMOGES.

Kamaradino **Pearls Simons** kaj **Ronald Lynn** prezentis la aktivaĵojn regule. La bulteno *La verda proleto* aperas trimonate, sed regule. La jara ĝenerala kunveno estis sukceso; ĉiuj klopodas havi kontaktojn kun la junularo. Raporto pri klasbatalo estas en preparo. En la kadro de varbado pli ol 100 leteroj estis senditaj, sed la rezulto estas

malgrava. La novelektita sekretario troviĝas en la persono de **Rosalynne Edwards**.

Kamarado **Pelle Persson** faris alarman raporton: la grupo de Malmoe malfondiĝis kaj tiu de Huskvara lamas. Granda monkvanto estas savita kaj deponita ĉe SAT. La grupoj de Stokolmo kaj Gotenburgo aktivas kaj entenas la plimulton dela membraro. La ligilo por ĉiuj *SLEA informilo* estas regule eldonita.

Kamarado **Nikolao Gudskov** estis invitita por diskuti pri la kreado eventuala de LEA en Rusio. Li sendos leteron al ĉiuj SATanoj kaj kunvenigos SATgrupon dum la landa Esperanto kongreso okazonta fine de januaro 1997. Rusio estas grandega kaj la bazo por kreigo de ILEA ekzistas.

Decido pri ESPERANTO NEDERLAND. Pasintjare ĉiuj LEAoj ricevis kaj pristudis la statutojn de E.N. por eventuala akcepto sine de la LEA-komitato. Montriĝas ke tiu akcepto ne povas efektiviĝi ĉar ne ĉiuj LEAoj konsentas.

Eseo monatotria:

*Omaĝe al Celedonio Romero, kin ĵus mortis post gitara vivo.
Celedonio, kiam mi aŭdas cian muzikon, mi atestas, ke ci vivas!*

Gitaro

Gitaro estas tre malnova muzikilo. Oni kutime nomas ĝin *klasika* gitaro por diferencigi ĝin el *elektrika* gitaro; sed tio ne taŭgas, ĉar neniuj *klasika* komponistoj verkis muzikaĵojn por ĝi. Nur Schubert (ankaŭ Beethoven, kvankam tio estas diskutbla) komponis por gitaro —kune kun aliaj instrumentoj, tamen, sed Franz Schubert —kiel vi eble scias— ne estis *klasika* sed *romantika* muzikisto, same kiel Beethoven.

Gitaro *senadjektiva* ja estas la *hispana* gitaro, ĉar ĝi naskiĝis en Hispanio. Araboj —tiuj karaj avoj niaj— alprenis rudimentan muzikilon en nia lando. Poste, en 1570, Vicente Espinel aldonis *kvinan* kordon —ankaŭ nomita la *espinela* kordo pro tio—, kiu sonas je la frekvenco de 440 c/s, kaj poste modesta nekonatulo aldonis pluan sesan kordon en la jarcento 18^a. Murciana Narciso Yepes aldonis aliajn kvar kordojn antaŭ kelkaj dekoj da jaroj, sed li ne estis sekvita de aliaj gitaristoj, ĉar oni opinias, ke pere de kvar utilaj fingroj je la dekstra mano oni preskaŭ ne povas silentigi nedeziratajn notojn kutime, kaj sekve oni ne povos bremsi kvar pliajn kordojn...

En Hispanio la gitaro ĉiam estis popola, kaj ĝis la fino de la 19^a jarcento, nur *afi-*

cionados (tio estas, amatoroj) ludis ĝin, precipe hejme, kaj famaj estis barbiroj kaj ciganoj inter ili. Antaŭ tiam, estis liuto kaj ĉefe *vihuela* (violo) la muzikilo por la riĉaj klasoj, dum gitaro —pli simpla, sen duoblaj kordoj— restis propraĵo *demotika* (popola). Je la jarcento 17^a aperis kelkaj gitaristoj kiuj eĉ lasis lernolibroj por bone ludi la gitaron, kiel la fama *Instrucción de música sobre la guitarra española y método de sus primeros rudimentos hasta tañerla con destreza* (instruado pri muziko pri la hispana gitaro kaj metodo de ĝiaj unuaj komencadoj por manludi ĝin lerte) de Gaspar Sanz, publikigita en 1674. Sed li ne estis sola, ĉar aliaj hispanoj verkis similajn librojn, kiel ekzemple Luys Milán, el Valensja (*El maestro*, la majstro, 1535), Valderrábano (*Silva da sirenas*, 1547), Bermudo (1555) kaj Amat (1596).


Sed en la pasinta jarcento aperis muzika giganto, Fernando Sor, kies 64 verkoj por gitaro estas ankoraŭ luditaj de gitaristo tra la tuta mondo. Bedaŭrinde, ĉar li estis *afrancesado* (francigita, tio estas, akceptis la francan regadon de la frato de Napoleono), li devis ekziliigi kaj liaj verkoj ne plu estis konataj en Hispanio. Poste, je la fino de la jarcento kaj komenco de la jarcento 20^a, Francisco Tárrega fondis novan

skolon pri gitaro, kaj levis tiun instrumenton ĝis la graveco kiu korespondas al ĝi. Ankaŭ Andrés Segovia-n oni devas citi, ĉar liaj taŭgaj adaptaj kaj eltrovoj de antaŭa muziko (por gitaro kaj ankaŭ aliaj muzikiloj), inter ili tiu de Fernando Sor, indas doni al li postenon en la historio de la muziko, aldona al sia mastreco ludante la ilon, kiu gajnis por li la titolon de *plej bona gitaristo* en la mondo.

Hodiaŭ multaj famaj aŭtoroj verkas por gitaro, kiel Jean Absil (belgo), Mario Castelnuovo-Tedesco kaj Luigi Nono (italoj), Federico Moreno Torroba kaj Joaquín Rodrigo (hispanoj), kaj tiel plu. Inter ili, mi ŝatus elstarigi Joaquín Rodrigo, kiu malgraŭ lia blindeco verkis la plej notindajn muzikpaĝojn iam ludataj de gitaro. Mi referas —kompreneble—, al lia *Concierto de Aranjuez*, kies *guajira* (gŭahira, tipa kuba danco, tie nomita *Allegro con Spirito*) kaj marŝo (tie nomita *Allegro Gentile*) tre arte ĉirkaŭflankas ege sentite aman kanton, tie nomita *Adagio*. Kaj tiun parton kantisto Richard Anthony plagiatas dum la jardeko 60. Eĉ kelkaj *konatuloj* diris tiam, ke *hispana muzikisto estis faranta orkestran aranĝon pri tiu kanto*. Sed Rodrigo jam estis farinta la tutan koncerton je la jaro 1940. Multaj gitaristoj ludis la koncerton, inter ili Celedonio Romero. Sed ne Andrés Segovia. Por tiu Joaquín Rodrigo verkis *Fantasia para un gentilhomme* (Fantazio por afektema viro), sur temoj de Gaspar Sanz kiujn oni trovas en la *Instrucción...* Tamen, se oni aŭskultas la originalajn temojn kaj la *Fantasia*-n, oni ne povas ne agnoski la genion de Joaquín Rodrigo.

Sed gitaro ankoraŭ estas uzata ĉie kiel popola muzikilo. Ĉar —kiel Gaspar Sanz

diris— *no es moça de mirame y no me toques* (ĝi ne estas *virino* por rigardi sed ne tuŝi [ludi] ŝin). Fakte gitaro povas esti tre facila kaj malfacila instrumento samtempe:



post kelkminuta instruado oni povas scii tri *posiciones* (manposiciojn) kaj akompani sian kanton. Sed se oni volas, ke la gitaro kaj kantas kaj akompanas sin, oni devas

serioze dum longaj jaroj. Estas domaĝe, ke en Hispanio gitaro ne estas pli prizorgata de la registaro. Vi povas serĉi profesoron privatan, aŭ akademion, sed se vi elektas studi ĝin en konservatorio, vi devas scii, ke ne estas la plej bona elekto: dum multe da jaroj vi studos, sed eble via ludado ne estos tiel bona, kiel dezirite, estante la kaŭzoj tre malsimplaj: institucia, strategia, profesora...

Ekzistas gitara premio en Castellón de la Plana ĉiu jare. Tio estas, ĉar Castellón (pr. kasteĝon') estas la naskiĝlando de Francisco Tárrega. Tiu homo estas konsiderata la patro de la nova hispana skolo gitara, ĉar kiam li estis dekok jaraĝa li komencis sian unuan gitaran turneon tra Hispanio, Portugalio, Francio kaj Britio. Samtempe, li verkis multajn belajn verkojn por nia instrumento, estante la unua *ludaŭtoro* de gitaro post jarcento; sed lia ĉefa kontribuo al la gitaro estas, ke li disvolvis novan teknikon ludi, kaj li havis multajn famajn disĉiplojn, kiel Miguel Llobet, Emilio Pujol (kies fama *Escuela razonada de guitarra*, t.e. rezonita skolo de gitaro) estas eĉ nun la prototipo de manlibro pri gitaro) kaj la jam menciita Andrés Segovia.

Renato Rodríguez

Muziko: Solene kantis Solo, kune kun sia elektronika-sinfonika muziko

Solo (Eduardo Vargas) jam estas konata en la esperanta etoso. Li muzikas pri diversaj originalaj stiloj: pop, elektronika, tekna, klasika, etna..., tia miksado estas sur islamaj-modernaj ritmoj, pro la HEF kongreso de ĉi tiu jaro li partoprenis prezentante iujn jam konatajn kanzonojn de lia repertuaro, ĉar la ĉeestantoj estas diversaj li prezentis miksaĵon da muzikaĵoj por ĉies gustoj —ĉu modernaj, ĉu klasikaj—, sed precipe li debutis por la kongreso sian novan projekton por la esperanta muziko, kio temas pri elektronika-sinfonika muziko farita pere de sintezilo, tia muzikaĵo nomiĝas **ASTREA 1/2/3**.

La nova projekto kiun Solo komencis temas pri interesa laboro da muziko alvenita el influoj de la komponistoj de la komenco de nia jarcento kiel: Bela Bartok, Honegger, Prokofiev, kaj tiel plu. Evidente tia muzikstilo ne estas komerca, sed interesa por la evoluo de nia lingvo: la kanto similas alnuntempa atonala opero kiu memorigas al Schönberg kaj la *Aŭstra Skolo*. *Solo* jam debutis la pasintan monaton en preĝejo de Malago du muzikaĵojn en simila stilo titolitaj *Regina Hotelo 777* kaj *Demetrios kaj la ŝipo*. Tiuj tri muzikaĵoj apartenas al trilogia laboro kiun li ne ankoraŭ finis.

Estis la ĝusta horo kiam *Solo* asperis surscene, vestita per speciala vestaĵo. La salono mallumis kaj silentis, komenciĝis la koncerto per bona sono kaj klara voĉo (laŭ la aŭskultantoj). Kiel ni jam diris, Eduardo debutis sian novan *Astrea*. Ĝi estas

malgranda sinfonio dividita en tri interrilataj partoj: la unua estas *enkonduko*, la centra *kadenco* kaj la lasta esprimas la *adiaoŝon*. La muziko estas aŭ *sinfonika* aŭ *ĉiela* etoso, kaj brua kaj elektra, ĝi argumentas la kreaĵon de galaksio kune kun ĝia hierarkio kaj astralaj mondoj, per tia stilo ni povas penetri en la grandajn misterojn de la Granda Kosmo kiu ĉirkaŭvolvas nin. La kantataj tekstoj estis verkitaj de la grupo literaturo *Ibere-Libere*.

Tiu ĉi estas la lasta koncerto de granda esperanta muzikisto, *Solo*. Sed tute ne estis la unua! Aliaj koncertoj liaj jam okazis en la Andaluzo Kongreso de Torroks (1989), en la Kongreso de la Hispana Federacio de Esperanto en San Cugat (1990), la Katalana Kongreso en Taragono (1991), post kiam li faris turneton tra Francio en 1992: Limoges, Rodez, Montpellier..., dum kiu li ankaŭ muzikis je la SAT Kongreso en Bordeaux; denove en la HEF kongreso de Merido; en la Universala Kongreso de Valencio kaj ĉe la Internacia Festivalo en Parizo je 1993, en la HEF Kongreso en Malago je 1994, kaj nun en Murcio (1996).

Dum ĉi tiu kongreso li ankaŭ montris al ni sian kasedografion, kiu konsistas el kvar kasedoj: *Kosmo infano* (1990), *Ili estas nur kanzonoj* (1992), *Vulkano* (1994), *Miraklo* (1995). Li ankaŭ partoprenis en sonbenda projekto, *VinilKosmo*, kiu estas kompilaĵo de Eŭroka kun aliaj artistoj de la movado esperanta. Nun li pretigas albumojn pro ebla eldono de la nova projekto pri sinfonika-elektronika muziko kun la muzikaĵoj: *Hotel Regina 777*, *Demetrios kaj lia ŝipo*, kaj la lasta debutita *Astrea 1/2/3*.

Blanca de Fusa

Debatindaĵoj

K.F.D.

Dudek kutimaj demandoj pri Esperanto kaj ĝiaj respondoj

Kutime geesperantistoj devas senofendiĝi kiam ili aŭdas stultaĵojn pri Esperanto. Ni jam respondis la du unuajn demandojn (*Kio estas ESPERANTO?* kaj *Se Esperanto estas tiel bona, kial ĉiuj ne jam adoptis ĝin tra la tuta mondo?*) Se vi havas aliajn respondojn, ni ege ŝatus ekkoni ilin. Nun ni respondas la trian:

3. Esperanto estas nulo!

Nulo signifas **nenion**. Ankaŭ ĝi estas la plej bona eltrovaĵo de matematikistoj kaj eble de la homaro: ĝi metis nombrojn pozitivajn kaj negativajn je iliaj ĝusta loko, kaj danke al ili arabaj nombroj — kiuj enhavas nulon — estas uzataj tra la tuta mondo anstataŭ la romanaj nombroj — kiuj ne enhavas ilin —. Antaŭ ili, kalkuli oni nur povis matematikistoj ($XC+XIV=CIV$), sed nun tion povas fari taksiistoj, dommastrinoj kaj eĉ infanetoj (tio estas: popolo: $90+14=104$). Se ni konsideras, ke adopto de arabaj nombroj tra la mondo daŭris pli ol tri cent jaroj, sed hodiaŭ ni ĉiuj uzas ilin malkompreneble kiel oni povis eĉ **malpermesi** la uzado de ili, estante batalo pri ĉu uzi arabajn ĉu romajn, ni ĝojas ekscii, ke ankoraŭ restas sufiĉe da tempo antaŭ ol **ĉiu mondano** datiĝos... :-)

Krome, nulo estas NEŬTRALA, ne pozitiva aŭ negativa, kaj same Esperanto estas NEŬTRALA: nek slava, nek okcidenta, nek amerikindia nek afrika...

Neniu avantaĝas sur kunuloj kiam oni uzas ĝin ĉe internaciaj kunvenoj.

Je neniu alia senso estas Esperanto nulo. Sed se oni nuancigus tiel dogman malaserton, oni povus plinuancigi nian respondon.

4. Esperanto estas okcidenta eŭropa lingvo, same kiel la angla. Ĉu ĝi ne estas tiel malfacila kiel la angla por orientano?

Se la kreinto de Esperanto naskiĝis en Pollando (Eŭropo), el tio ne sekvas ke sia laboro estas ankaŭ eŭropa, eĉ ĉar lia gepatra lingvo estis la jida, kiu ne estas eŭropa, nek okcidenta... Tamen, Zamenhof — kiu parolis kelkajn idiomojn kaj orientajn kaj okcidentajn — skizis sian lingvon tiel, ke la strukturon kaj vortojn agnoskas ni ĉiuj: la aldona konjunkcio estas **kaj**, same kiel en la greka lingvo. La duban oni diras **aŭ** same kiel en la araba. Sed la plej eco de Esperanto, ĝia tuta manko da esceptoj, similigas ĝin al la ĥina, ĉar en tiu lingvo ankaŭ mankas ili.

Se, malgraŭ tio, kion mi diris, vi ankoraŭ opinias, ke Esperanto estas okcidenta, almenaŭ vi agnosku, ke eŭropa facila lingvo estas pli bone por orientano ol unu el la plej malfacilaj kaj mallogikaj lingvoj el Eŭropa, kaj kies *internaciaj* virtoj estas bazita sur mono kaj nova armilaro.

5. Esperanto estas artefarita lingvo.

Kompreneble. Oni ne trovis ĝin en la fundo de minejo, rivero, aŭ en arbo. Ĝi

estas artefarita, same kiel la aliaj lingvoj. Same kiel televido, niaj nelunaj satelitoj aŭ aŭtomobiloj.

Se kiel *artefarita* oni volas diri *lingvo*, *kiu oni lernis ene de gepatra hejmo*, kun la gepatroj, laŭ *natura* procezo kiu fontas el bezonoj realaj pri komunikado, en Hispanio ĉiu ne enlanda lingvo (nome: ĉiu lingvo escepte de la hispana, kataluna, vaska kaj galega) estas *artefaritaj*. Tio signifas, ke en Hispanio hodiaŭ oni instruas ĉe ŝtataj lernejoj kvar *artefaritajn* lingvojn: la anglan, la francan, la germanan kaj la italan. Krome, tiujn ĉi lingvojn oni lernigas pere de la plej *artefarita* institucio: la lernejo mem, kiu ne ekzistas en la naturo.

Nun oni rifuzas *artefariton*, sed tio estas ĉar oni ne scias, ke tiu vorto venas el latina **facio**, kiu volas diri *fari*, kaj **ars**, kiu signifas *arto*, kaj vere ĝi signifas **lertecon**. Kaj Esperanto ja estas lingvo farita per tiom da lerteco kaj efiko, ke oni povas esprimi iu ajn penson tiel klare kaj taŭge kiel oni ne povas pere de aliaj lingvoj kiuj estas *nur malartefaritaj*.


Aliflanke, de kiam geinfanoj eniras lernejon, oni kontraŭdiras senfine sian naturan emon al *ĝeneraliga asimilado*—natura emo en ĉiu homo kiu venas el racia cerbo homa—, kaj sekvante mallertan tradicion—praavan lingvon— kiu kontraŭbatalas komunikemo, oni perfortas geinfanon diri *anduve* (mi iris) anstataŭ **andé**, *hecho* (farita) anstataŭ la pli racian **hacido**, kaj hororan multon da neregulaĵoj arbitraj sen komunika aŭ lingva kaŭzoj, sed nur eble historia. Tio okazas ĉe ĉiu lingvoj okcidentaj, escepte de Esperanto, kiu—ĉar ĝi sekvas tiun naturan emon al ĝeneraligo— estas ne

nur facila por lerni, sed kiam oni jam parolis ĝin dum kelke da jaroj, ĝi loĝas ĉe la plej intima parto de nia menso, kaj la problemoj povas esti kiel diri *gepatrelingve* tion, kion oni pensas *esperante!*

6. *Por ke lingvo funkciu bone, ĝi devas esti NATURA, tio estas, ĝi devas aperi en konkreta lando, kun donita kulturo.*

Pli ol demando, tio similas dogman aserton kiu rilatas nenie al la realo. Esperanto aperis en konkreta lando difinita de netoleremo rasa, nacia kaj lingva (en regiono de Pollando kiu tiam apartenis al Ruslando) kun difinita elvoko demokratia, popola kaj tolerema. Ĝi aperis el menso de konkreta homo, same kiel ĉiu ajn vorto de iu ajn lingvo. Kaj aldone, ĝi estas neŭtrala, kia ne estas la tiel nomitaj naturaj lingvoj. Kaj, sekve, ĝi funkcias perfekte, kiel oni povas vidi ĉe internaciaj kongresoj kiujn oni faras ĉiu jare esperante. Ili estas la nuraj kongresoj sen tradukistoj, ĉar traduko—se estas farita— ĉiam okazas ene de la cerbo de la aŭskultanto. Ĉiuokaze, tiu respondo klarigas kia estas la kulturo de Esperanto. Aŭ ne?

Olga López



NOTO.- Originalan hispane verkitan dokumenton vi trovos en la interneta paĝo ESPERANTO ESPAÑA: <http://www.mur.lnet.es/uphm/jesuo/espe.html>
Ankaŭ angle. Esperanta versio sekvas.

Reagoj

Komentoj pri la Kastilia Lingvo,

aŭ oni devas science fundamenti sian opinion antaŭ ekverki.

La titolo kaj la artikolo povas ŝajni rektan atakon kontraŭ iu persono pro ties opinioj, sed tia ne estas la intenco. La rekta atako staras kontraŭ malbona kutimo ne bone pretigi kion oni verkas antaŭ ĝia surpaperigo. Pri tia kutimo mi devas nun korekti kelkajn erarojn kaj mispaŝojn el la artikolo *Kastilia, la lingvo kiu neniam ekzistis*, el antaŭa numero de nia organo.

Unue, kaj ĉar mi estas en Esperantio, ni trarigardu PIV-on kaj legu kio estas *Kastilio*, temo de nia artikolo. Jen do: *Regiono en la centro de la Ibera duoninsulo; kastilia: rilata al Kastilio; kastiliano: ano de la ĉefgento loĝanta en Kastilio*. Laŭ PIV, do, kastila lingvo estas lingvo rilata al Kastilio. Laŭ la kastila, etimologio *Castilla*, signifas *lando de kasteloj*. Laŭ la **Esperanta Etimologio** ĝi nenion signifas ĉar ĝin Esperantigante oni ne donis tian sencnon al la vorto. Konfuzi do inter *kastilo* kaj *kastelo* estas eraro, tiel simple. Sed, kio estas kastelo? Ĉu ĝi rilatas al iu parto de la ibera duoninsulo? Laŭ PIV ne. Se en alia Esperanto vortaro tiel tekstas oni bonvolu havigi kopion al mi por agnosko de mia malklereco.

Mi kredas, ke oni ne bezonas plian argumenton por refuti tian eraron, se jes jen ĝi. Nederlando ne estas lando de

muelejoj (do ne Muelejio), sed malalta lando, pro tio ke granda parto de ties tero estas sub la marnivelo. Laŭ vortkonstruo de Isabel Acevedo oni povus sin demandi kio estas Ibera duoninsulo? Ĉu duoninsulo de la iberoj? Parte jes, sed antaŭ tie ĉi loĝis pratempe keltoj kaj ne pro tio oni devas diri Kelta duoninsulo aŭ Keltio. La nomoj estas vortoj, kaj la vortoj estas nur tio, vortoj. Oni povas doni specialan signifon al ili sed respektante bazajn principojn por ebligi komunikadon kun samparolantoj. Tiel do se oni parolas pri Kastilio kaj ties lingvo en Esperanto, oni uzu Esperantan lingvon kaj ne donu al ties vortoj signifojn de kastiliaj vortoj.

Por informoj de nia gelegantoj oni devas klarigi ke regiono La Rioja (la rioĥa) nur antaŭ dum ne longa tempo *sendependiĝis* de Kastilio kaj ke ĝi ĉiam apartenis al la Kastilia regno ekde ties konkero (en la militoj kontraŭ muzulmanoj). Ankaŭ sciinde estas ke la kastila, kvankam ties unuaj skribaĵoj aperis en monaĥejo de San Millán de la Cogolla, aperis multe pli frue kiel parolata lingvo en regiono, *ne tute lokita ankoraŭ*, de nunaj provincoj Burgos, Álava kaj aŭtonoma komunumo La Rioja. Kiel kuriozaĵo mi mencias ke pro la proksimeco de tiu regiono al la eŭska

lingvio la kastila ricevis tre fortan fonctikan influon el tiu lingvo.

Kaj tio donas al mi novan argumenton por daŭrigi, senkulpigui min, la artikolon. Kiam oni komencis paroli la kastilian mi ne scias ĉu ekzistis galegoj, katalunoj aŭ kastilanoj, sed mi certas ke eŭskoj jam ekzistis kiel popolo ĉar dum jarcentoj la romianoj batalis kontraŭ ili kaj ties lingvo estas la plej antikva el Eŭropo. La etimologio mem de la vorto *eŭskaldun* (tio estas: eŭsko) signifas tiu, kiu parolas la eŭskan. Ĉu pli da klarigoj?

Por fini jam: mi volus aldoni mian personan opinion pri tia temo. Unue mi ĉiam kutimas uzi la formon *Kastilio* por nomi regionon kaj nomas la lingvon kaj la popolon kastilaj por tiel kongrui kun la reguleco de Esperanto: franco-Francio, anglo-Anglio, kimro-Kimrio. Por nomi la anojn mi uzas ĉu *kastilon* (ne kastelon!), ĉu *kastilanon*. Kiun ci preferas?

Por alia menciita popolo mi uzas la formon devenante el ties propra lingvo nome: eŭskoj-Eŭskio. Tiu ĉi formo estas uzata de la Eŭska Esperanto Asocio. Ĉu ĝi ne pli kongruas kun nia lingvo ol tiuj *vaskoj* kaj *baskoj*?

*Snaĵpero, Julio 1996
en la Aŭtonoma Komunumo de
Kastilio kaj Leonio. Hispana Ŝtato*

Kiel indiki la prononcon de la hispana litero ll?

En la artikolo *Lingve parolante... Kastilia, la lingvo kiu neniam ekzistis (Kajeroj el la Sudo, n^o 31, pĝ. 10)* la aŭtorino, Isabel Acevedo, citas du loknomojn, en kies ortografio aperas la litero *ll* de la hispana alfabeto, kaj interkrampe ŝi aldonas indikon pri la prononco laŭ la fonetiko de la Esperanta alfabeto.

1. Castilla (pron. kastiĝa)
2. San Millán de la Cogolla (pron. san miĝan' de la kogoĝa).

Mi deziras demonstri, ke la uzo de ĝ en la Esperantaj transkriboj ne estas ĝusta.

Unu el la problemoj koncerne la grafion LL en la hispana ortografio estas ĝia malsama prononco en diversaj partoj de Hispanlingvio. Se oni transkribas Esperantajn librojn kun hispanaj kaj hispanamerikaj temoj, kaj la aŭtoroj aŭ redaktoroj interkrampe aldonas fonetikajn transkribojn de nomoj kaj vortoj, la rezultoj estas kaosaj. En la hispana normolingvo LL estas laterala palatala sono, kies fonema simbolo estas /*ʎ*/. En parto de Hispanio kaj tra la tuta Hispanameriko tiu fonemo ne ekzistas. Anstataŭas ĝin jen la fonemo /*y*/ (=="j"), jen la fonemo /*3*/ (="ĵ"). en Hispanoameriko kelkaj esperantistoj volas uzi ĝuste tiujn fonemojn aŭ proksimajn ekvivalentojn por la asimilado de propraj nomoj kaj ankaŭ por klarigi la prononcon de vortoj. Jen kelkaj ekzemploj.

En *Venezuela Stelo* oni povas legi pri *Medeĝino* (Medellín) kaj *Alma Ĝanera* (Alma Llanera). En libro de Tibor Sekelj esperantigita de argentinano, la nomo *Lallana* aperas sur unu paĝo kiel *Layana*, sed aliloke estas informo, ke la prononco estas *laljana*. Libro eldonita en Argentino klarigas, ke la prononco de *jarilla* estas *hariĵa*. En la *tekstolibreto de la kasedo* **Horo de Opozicio** la prononco de la ĉilia nomo *Allende* estas indikita kiel *aĵende*.

Ni rigardu, ĝis kiu punkto povas konduki ĉi-speca fonetikisma asimilado. Ekzistas samnomaj urboj en Hispanio kaj en la Nova Mondo. Ĉu ili pro tio havu du Esperantajn formojn spegulantajn la lokajn prononcojn?

1. **Valladolid:** Hispanio: Valjadolido. Meksiko: Vajadolido.

2. **Medellín:** Hispanio Medelĵino. Kolombio: Medeĝino.

Laŭ hispanlingvaj fonetikistoj¹, la uzo de sonoj *j*, *ĝ*, kaj *ĵ* anstataŭ la ĝusta laterale palatala sono estas regionaj apartaĵoj de la lingvo. Sekve, ili neniel povas esti neŭtralaj prononc-manieroj. Tiuj lokaj variaĵoj nenecese komplikigas la transskribadon de hispandevena leksika materialo en Esperanto. En mia studaĵo pri principoj por esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj² mi substrekis, ke oni ne okupiĝu pri prononcvariaĵoj de la hispana lingvo sed akceptu nur unu norman prononcon por transskribaj celoj. Por la *klasika* prononco de *ll* oni povas uzi la du literojn *lj* de la Esperanto alfabeto. Kvankam ili nur proksimume redonas la sonon de *ll* (tiu fonemo ne ekzistas en Esperanto), kaj kvankam ĝi ne estas la

universala prononco de *ll* en ĉiuj regionoj de Hispanio kaj Hispanameriko, tamen ĝi estas instruata al eksterlandaj lernantoj de la hispana lingvo. Ĝi estas klara kaj neambigua, malhelpante konfuzon inter la grafioj *ll* kaj *y*, kiel ofte okazas ĉe nekleraj homoj, en kies lingvo *ll* kaj *y* estas du manieroj skribi unu fonemon, do ili ne diferencas inter si fonetike. Plue, en hispanaj vortoj kaj nomoj literitaj per *ll*, transskribo per la dulitero *lj* en Esperanto estas aŭde kaj vide pli proksima al *ll* ol transskribo per simpla *l*: *Seviljo*, *mantiljo*. Sammaniere estas rekomendinde transskribi la du nomojn en la citita artikolo: *Kastiljo*, *Sanmilĵano de la Kogoljo*.

Bernard Golden

NOTOJ.-

¹Juan M. Lope Blanch: *El Español de América*, Madrid, 1967.

-Tomás Navarro Tomás: *Manual de Pronunciación española*. Madrid, 1968.

²Bernard Golden. *Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj*. Pĝ. 235-257 en *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*. II. Esperantismo. La Laguna, 1987.



Lingve parolante:

La esperantistigo de Méjico,

de Bernard Golden

Komplikita problemo de asimilado

Diversaj proponoj estis faritaj por la ĝusta esperanta formo de la hispanlingva toponimo *México*. Ĝi bezonas specialan pritrakton, ĉar ĝi rilatas al diversaj lokoj, kiuj, laŭ kelkaj esperantistoj, devas esti diferencigitaj en Esperanto per ortografiaj modifoj. Jen kiel Bertil Wennergren reliefigas la problemon:

*Aparte komplikita estas la kazo Meksiko, ĉar ni havas ne malpli ol kvin aferojn kun tiu nomo: la lando **México**, la urbo **Ciudad de México**, la federacia ŝtato **México**, la golfo de **México** kaj la usona ŝtato **New Mexico** (Planlingvistiko, 1985, aŭtuno; 4 (15): 4).*

En sia rtikolo Wennergren ne proponas solvon. Tion mi faros ĉe la fino de tiu ĉi artikolo.

Etimologio de la toponimo

La deveno de la nomo **México** estas la azteka (nahŭatla) esprimo **Metz-tli-a-pan**, *inter la akvoj de la luno*. Ĝi akiris la formon **Meztlixinhtlico** kun la signifo *la umbiliko de la luno*, t.e., mezo de akvoj. La urbo estis konstruita sur insuloj en lago. De ankoraŭ unu variaĵo de la nahŭatla nomo, **Metzixihco** venis la urbonomo **Mexihco**, kiu evoluis al la

hispana toponimo *Méjico*. Alia interpreto de la sama nomo estas *ĉe la sanktejo de la militdio Mexitl*. **México**, do, ne estas nomo de gento sed de loko. La hodiaŭaj loĝantoj de la lando estas posteuloj de indianoj de pluraj diversaj triboj kaj lingvo-grupoj kaj hispanaj kolonianoj. Okazis fizika kaj kultura interkruciĝo, kaj nova kulturo estiĝis.

Etnolingvaj formoj de la toponimo Méjico

En la moderna hispana lingvo **México** estas prononcata "méhiko"; la arkaika **x** (elp. ŝ) havas la saman prononcon kiel la hispana **j** (kp. **Quixote**, kiŭfote). Prio tio kelkfoje estas uzata la ortografio **Méjico** sed ĝi ne estas ofta. En la plimulto da etnolingvoj la **x** estas prononcata *ks* kiel en la latina lingvo; angla **Mexico**, franca **Mexique**, germana **Mexico**, rusa **Meksika**. Esceptoj estas itala **Messico** (mesiko) kaj la rusa nomo de la federa ŝtato kaj la ĉefurbo **Meŝiko**. Sekve de tio, la plej internacia formo en Esperanto estas **Meksiko**, en kiu la akcento troviĝas sur la antaŭlasta silabo anstataŭ la unua de la originala nomo.

Konflikto inter Meksikio, Meksiko kaj Meksikujo

En *Lingva respondo* n^o 47, publikigita en *Oficiala Gazeto* en 1911 (n^o 18B en la 6^a eldono de *Lingvaj Respondoj*), D^o Zamenhof skribis:

[...] Ni neniam devas diri, **Meksikujo**: ni devus diri Meksiko, sed por fari diferencon inter la urbo kaj la samnoma lando, mi konsilas nomi la urbon Meksiko, kaj la landon Meksikio (kiel Alĝero-Alĝerio, Tuniso-Tunisio, kaj tiel plu. Pĝ 15).

En artikolo pri Brazilo kaj Meksiko (*Heroldo de Esperanto*, 7/1981, paĝo 3), A. Vaitilavičius apogas la elekton de Zamenhof en la ĉi-supre citita **Lingva respondo**, sed en la sama periodaĵo (12/1981, paĝo 2), André Albault, tiama prezidanto de la Akademio de Esperanto, emfazis ke la landnomo *Meksiko* estas oficiala. Oni aprobis ĝin, ĉar ĝi apartenas al tiuj nomoj, kiuj estas *sendube internaciaj kaj tradiciaj en niaj lingvo*. En la *Jarlibro* de UEA aperas en la hispana formo **México**. La landa asocio nomiĝas Meksika Esperanto-Federacio.

Nekonsekvencu lingvouzo en Plena Ilustrita Vortaro

Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) la landnomo estas *Meksikio*, kaj la ĉefurbo nomiĝas *Meksiko*. Sekvas, ke *meksikano* estas loĝanto de la ĉefurbo, kaj *meksikiano* loĝas en la lando. Troviĝas ekzemplo de nekonsekvencu uzo de la adjektivo *meksika* en PIV. Pulkvo estas priskribita kiel *meksikia brando*, kaj meskalino venas de mesikia kaktaco, sed sisalo estas difinita kiel fibro, ekstraktata el la folioj de meksika agavo! La ĝusta esprimo estas *meksikia* agavo.

Ankoraŭ kelkaj variaĵoj

A. Vaitilavičius, apoganto de la landnomo *Meksikio*, proponas nomi la ĉefurbon *Mehiko*, verŝajne pro influo de la rusa nomo de la urbo. En sia *Esperanta Bildvortaro* (1989) Rüdiger Eichholz registras *Meksikio* kaj *Meksiko*, sed preferas *Meksikjo*, kiu estas formita per la nova sufikso *-j*, elcerbigita de iu S^{ro} Cool por forigi la ĝisnunan neregulecon en formoj de landnomoj. La sola esperantisto, laŭ mia scio, kiu insiste diferencigas ĉiujn toponimojn kun identaj formoj, estas Richard Schulz (=Rikardo Ŝulco). En sia *Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj* (1989) li registras la sekvajn nomformojn: *Meksiko* (la urbodomo), *Meksikujo* (la landnomo), *Meksikujano* (la loĝanto aŭ civitano de la lando). Li preteratentas la konsekvencon formon *meksikano* por nomi loĝanton de la ĉefurbo. Cetere, li ne diferencigas la landnomon disde la nomo de la federa ŝtato. Fine, en *Enciklopedio de Esperanto* (1933-1934) troviĝas la tre malofta nomformo *Meksiklando*.

La plej racia solvo

Jen kiel mi diferencigas la kvin signifiojn de la toponimo *Meksiko*:

Meksiko	la lando
Meksikŝtato	la federa ŝtato
Meksikurbo	la ĉefurbo de la lando (Ciudad de México).

Loĝantoj kaj civitanoj de ĉiu loko estas indikeblaj per aldono de la sufikso *-an*.



Etnismo

Eŭropo seneŭropana... kie estas eŭropanoj?

Usonanoj

kutime envias eŭropanojn, ĉar oni havas multe da antikvajn monumentojn, plene da historiaj eventoj, kaj ne ekzistas usonaj okazintaĵoj pli malnovaj ol du cent jaroj..., aŭ almenaŭ tion ili kredas.

Tia opinio ne plene konscias pri la mema kaj aliesca historioj. Fakte, Usono —nek Ameriko tuta— ne ekestis el nenio antaŭ du —aŭ kvin— centjaroj. Fakte antaŭ multaj miloj da jaroj homoj aperis tie. Ili starigis diversajn kulturojn —jen migrantajn (siuksoj), jen sidantajn (aztekoj)—, kies mirantoj de Rousseau plibonigis troe. Tamen ili estis ne malpli batalemaj ol la ticaj *eŭropidaj* loĝantoj.

Tiam Kristoforo Kolombo enkondukis mezepokan kulturon ŝokante la antikvajn kiuj loĝis en Ameriko, kaj enmiksiganĉe ambaŭ kulturojn. Kelkaj jarcentoj poste, puritanaj rifuĝintoj alvenis el sia rifuĝo nederlanda, sed ankoraŭ fuĝante de sia brita reĝo, kiu volis mortigi ilin. Ili ne miksiĝis kun la indiĝenoj, ĉar, (malsame de la hispanoj en la sudo antaŭ du jarcentoj), ili kunportis edzinojn kaj gefilojn. La rezulto estis tragika kolizio inter antikva kulturo kaj moderna, kiu posedis pafilojn sed ne naskiĝlandon amikeman por reiri.

Post du centjaroj, tre malmulte el la tiamaj 500 nacioj restas en Usono nune..., kaj la usonanoj nunaj certe ne estas la filoj de la indianoj malnunaĵ, sed filoj de la koloniistoj kiuj amase mortigis ilin por okupi ilian

landon. Do, kiu estas la pragepatraro de la usonanoj hodiaŭaj? Post la unuaj britoj, el alie multaj homoj alvenis en Amerikon Nordan: irlandanoj, germanoj, italoj, hispanoj, francoj, ĉeĥoj, rusoj, afrikanoj — kontraŭvole, vere, sed tie ili nun estas. Veras, ke neniu el ili nun sentas germane, brite, irlande, itale, hispane, france, kaj tiel plu. Ne, ili ĉiuj sentas *usone*, tio estas, ili sentas, ke ili ĉiuj havas komunan nacion, komunan kulturon —ne pli malnova ol du centjaroj—, kaj ili ĉiuj volas, ke *May God Bless America* (Dio benu Usonon).



Kaj mi demandas al mi, ĉu tiu ĉi komuna nacio farita el diverseŭropana origino ne estas vere la esenco de la eŭropismo? Ĉu tio ne estas kion la eŭropistoj de Maastrich volas? En Eŭropo ni ne trovas eŭropanojn: ni vidas hispanojn (diverstipajn, certe), francojn, italojn, nederlandanojn, germanojn, kaj tiel plu. Sed nenie ni povas trovi *eŭropanojn* en Eŭropo. Por trovi ilin, oni devas iri al Usono aŭ Sudameriko. Ĉu ne estas ridinde, ke la solaj eŭropanoj kiuj ekzistas diras, ke ili estas *ne eŭropanoj*, sed *amerikanoj*?

Eble multaj amerikanoj ne konsentos kun mia opinio, sed se ili pensas ripoze pri ĝi, eble ili opinios, ke mi pravas!

Isabel Acevedo



LA 55^a KONGRESO HISPANA DE ESPE- RANTO en Murcia



La 55-a kongreso de Esperanto okazis de la 12-a ĝis la 17-a de julio de 1996 en la mezgrada lernejo **Licenciado Cascales**, de Murcia.

La vendredon 12^{an} de julio 1996

Je la 16:00 horo ni ĝuis la *interkonan vesperon*. Samideanoj venis, individue ni salutis unu la alian. Ekzemplero de *Kajeroj el la Sudo*-n oni prezentis al ili, kaj la reagoj estis variaj: kelkaj samideanoj esprimis varmetan opinion pri la magazino, kaj aliaj eĉ akran opinion pri eraroj trovitaj en ĝi. Ĉar la ekzemplero trakuris la kongreson dum la sekvontaj tagoj, kaj multaj samideanoj legis ĝin interese, la redaktoro korektis la erarojn kaj faris *Kongresan eldonon* kiun nome de Hale li donacis al la kongresanoj.

1 GRUPAJ SALUTOJ

Je la *sabato 13-a de julio*, je la dekunua horo, estis la malfermo de la kongreso, kun salutoj de diversaj esperanto-grupoj

de Hispanio, paroloj de aŭtoritatuloj, kaj ankaŭ festparolo de nia Prezidanta Moŝto, S-o Antonio Alonso Núñez.

Unue parolis samideadino Trini, el St. Cugat, S^o Hernández Yzal, direktoro de la Esperanto Muzeo, kaj Tomás, el San Javier. Ankaŭ krokodilis france lernanto de la lasta kurso de Esperanto en San Javier, *René*. Li diris, ke “en 1936 mi vidis murafiŝon faritan de la *Filatelique Française* en Esperanto. Sur la ĵurnalo *Libertaire* estis parto verkita en Esperanto. Je la fino de mia vivo mi povis plenumi mian revon: lerni Esperanton. Ĉiam la espero venas”.

Post René, **Javier García** ankaŭ krokodilis, sed hispane. Li diris, ke “*mi jam lernas Esperanton dum ses jaroj. Mi loĝas en Benidorm kaj laboras por Esperanto tie. Mi faris kurson de Esperanto kaj oni faris al mi intervjuon televidan. La momento de Esperanto ankoraŭ ne alvenis, sed kiam ĝi alvenos devas esti*

grupo pretigita. Pli grava ol Esperanto estas la esperantismo, kiun la lingvo portas kiel vehiklo. Mi invitasd vin ĉiujn al mia domo en Benidorm, se vi volas viziti min”.

2 GRAVULAJ SALUTOJ

María Guirado, katedrulo pri la hispana en la kongreseja lernejo, salutis nin nome propra kaj de la direktoro de la lernejo. Ŝi promesis, ke la venontan fojon ŝi tion faros pere de Esperanto.

Pedro Guerrero, urbestarano en Murcia kaj profesoro pri Didaktiko de la Lingvo ĉe la Universitato de Murcia, diris, ke li “*deziras al vi bonan iradon, ĉar vi iras kun la romantika flago kontraŭ ekonomikaj interesoj kaj la angla imperio kaj la hispana. Sub lingvo estas armeo, kaj la nura armeo kiun vi havas, estas la deziro de komuniki. Ni vivas en socio kies absurda leĝo estas merkantilismo. Gratulon por esti tiel romantikaj, tiel sindonemaj kaj por labori por Esperanto”.*

Francisco Miguel Muñoz Garre, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, diris: “*Ni intencas, ke la funkciado de la Kongreso estos tiel bona kiel ebla. Saluton”.*



nas al kongreso? Ili laboras aparte. Laŭ nia kongreso, la ĝisnuna strategio klopodis antaŭenigi de la lingvo ne koincidas kun deziroj de junuloj.

Estas vere surpriza la kontrasto inter niaj kamaradoj kaj la agado: la Ministerio interesas pri la pre-universitata kurso de Santiago. En germana universitato oni studis pri la propedeŭtiko de Esperanto. La junularo ne volas *kamaradojn*, sed *novajn esplorojn*.

Mi petas vin, ĉu estas vero, ke junularo ne interesiĝas pri kamaradoj, sed pri agado? Tio estas la tasko: la junularo meritas apogon. Kio estas la aspiroj de la junularo nuntempe? Ĉu ni, la veteranoj, sukcesos prave aŭskulti la junularon, tial ke ni transdonos la aferon al ili? Ili estas oficiale petitaj prezenti al ni iliaj petoj kaj aspiroj.

Ni postulas, ke la universitatoj donu titolojn kun oficiala valoro. Tion oni jam havis de la universitato de Valencia unufoje en Hispanio.

La esperantistoj havas multajn petojn por fari.

La kongreson mi malfermas.

3 FESTPAROLADO.-

Post tio, la Prezidecanto de HEF, Antonio Alonso Núñez, adresis al ni jene:

Mi opinias, ke ni devas studi novan strategion por HEF. Kial, se estas tiom da junuloj kiuj laboras, ili ne ve-

4 DEMANDOJ KAJ KOMENTOJ.-

Post tio, María Guirao demandis ĉu estas teksto por lerni Esperanton. Oni diris al ŝi, ke estas multe da literaturo en kaj pri Esperanto, kaj ankaŭ estas kursoj perkorespondaj.

Pedro Guerrero tiam diris, ke estas multe da hindo-eŭropaj radikoj en Esperanto. Li rakontis anekdoton de sia amiko Damián Rabal, kiu ne interkomunikis kun sia rusa amiko ĝis kiam li skribis al li leteron en Esperanto. Damián tute komprenis ĝin kun helpo de malgranda vortaro. Poste, la ruso venis al Madrido kaj ili interkomprenis bone.

-o0o-

5 INTERAKTE

Post la festparolado kaj intervenoj de samideanoj kaj ekstermovaduloj, ni babilis ĝis la 13-a, kiam ni staris por la Oficiala foto. Eble estis la programita preskonferenco, sed mi ne atendis ĝin...

6 EKZAMENOJ DE ESPERANTO

Je la posttagmezo estis problemo: laŭ la Kongresa Libro devis esti *Ekzamenoj de Esperanto*, sed ILEI nun organizas siajn ekzamenoj kaj atestoj pri kompetenteco pri Esperanto, kaj laŭ la ILEI respondeculo, Sr-o Tarín, oni ne povas ekzameni aŭ ekspedi titolojn nome de ILEI. Du samideanoj volis ekzameniĝi, ĉar ili kredis, ke la kongresa libro pravus. Finfine la problemo estis solvita: HEF donus atestilon pri kompetenteco al tiuj ekzamenatoj kiuj provus sian lingvokapablon. Nur unu kandidato ekzameniĝis, Javier García, kaj li finfine obtenis la atestilon tiel dezirata. Gratulon. Javier!

7 GRAVULA KUNSIDO

Dum la ekzameno okazis, estis kunsido de la estraro de HEF kun delegitoj de la grupoj kaj sekcioj.

8 PRELEGO HISPANA

Je la 18:00 estis prelego pri *Facetas de don Ricardo Codorníu* (Flankoj de Rikardo Kodornju'), dirita hispane de **don Enrique Morales**, aŭtoro de la libro *El viejo árbol: vida y obra de don Ricardo Codorníu*, kiun ni jam komentis en la lasta numero de *Kajeroj el la Sudo*. Li diris jene:

Ricardo Codorníu estis bona homo. *Bona homo* ne estas *bonulo*. Diri ke iu estas *bonulo*



indikas kompaton, patremon kaj rezignacion pri kion oni ne povas juĝi kiel propra, nek kompreni tute. Sed ankaŭ enhavas iomete la koncepton de homa malriĉeco kiu balastas tutan vivon: *la malfeliĉa viro estis tio, kio li povis esti: bonulo...* Ne tiu sence Ricardo Kodorniu estis bonulo: li ne dubis en lia trankvila kaj klara juĝo, li flankiĝis vere, sciante ke, post kelke da tempo, la celo estos atingita.

Rikardo Kodorniu havis sian rigardon metita je la neniel miopa horizonto de sia genio. La parabolo de lia penso, tiel, celis kiel eble plej malproksime; al la alto kiu liaj pulmoj de malnova ciklopo bezonis por enspiri pene la bluan de la ĉielo; la sonon de l' silento; la malkutiman kaj profundan krion de birdo kiu supernaĝas la infiniton, senscie pri tera krusto. De tie, de blua manĝaĵo kiu fortigis la Malnovan Arbarulon, en sia ĉiama kontakto kun Naturo tiel maltrankvila kiel sia koro, Codorniu premis tion, kion oni nomas *destino*, kaj faris ĉirkaŭe de si plastikan materion kiu ekbrilis en sia verbo kaj li iĝis ian manaon kiu satigis multajn homon, pere de lia ekzemplo.

Liaj multaj kaj bonaj flankoj malkovras, ke tiu murciano-kartaĥenano kaj kartaĥenano-murciano estis diamanto. Estas multaj Kodorniuoj en Don Ricardo kaj pluraj Ricardoj en Kodorniu, kiel lia multiflanka vidpunkto montras; kaj tiu vidpunkto havas Dion — sendube — je sia centro, homon je sia flanko.

La *Apostolo de l' arbo*, sed ankaŭ de la homa speco, ĉiam konsciis, ke naturo estas forta por servi kiel ekzemplo al homo. Meze de ĝeneraligita ikonoklasto, tiel viva tiam kiel nun, la loĝanto de la domo je la Moleo¹, ĉe la rivero, en sia tempo fonto de drinkebla akvo, li sciis kiel stari firma. Vivi siajn

¹*Hispane: Malecón.*

²*España* estas montaro de Murcia.

kredojn. Sed vivi ilin praktike, realigante projektojn kiu dummomente trairas sian menson kaj ne finas ĝis li vidas sian laboron iĝintan arbon, monton, birdon, vojon en *España*²; dunon subtenitan en sia malekvilibro en Guardamar... Li faris tion pro kohero; por montri al si — kaj sekve al aliularo — ke tio, kion unu homo povas fari, aliu ankaŭ povas fari sen plia aldono de energio elirinta la racion.

Sekve, lasitaj nostalgioj el pasinteco; eĉ emerita, kun infaneco kaj juneco pendante en la ŝranko por ĉiam fermita, li ekpensas kiel vivi la reston el siaj jaroj. Li povis (kaj li havis rimedojn por tio, kaj ankaŭ moralan aŭtoritaton por decidi ripozi) apartiĝi al malnova domego familia kune kun Mercedes, la edzino Bosch Bienert. Neniu riproĉus al li ke la malnova leono dezirus ripozi, reiri al kapitala kvartalo, post tiom da laboro, kune kun sia fidela Baldomero — alportante akvujon sur azeno — tra la vojoj de *España*, kvazaŭ estus la horo por akvumi. En proksima horizonto, monumentoj en *el Retiro*, la plej estimata parko de Madrido; en *España*, antaŭ la Arbara Domo, rigardante la altojn de Morrón; en Sankta Domingo, la placo kie li batalis por defendo ĉiam pasia pri la fikuso grandega, kiu en tiu maljunulo havis sian plej bonan defendanton... Li ankaŭ enkondukis en Hispanio Esperanton. Li estis, tial, por aliuloj, bildo de

maljunulo kiu lekas en sia angulo la vundojn de l' tempo. Sed li diris, ke sia bildo ne jam aperis, ĉar li ankoraŭ ne donis el si la plej bonon: la trezoron de eksperto. Eksperto taktita de kadenca ritmo de boneco, kiu li disdonis al tiuj, kiuj trairis sian vojon. Kiu estis lia konkludo kiam li emeritiĝis el aktiveco? Ĝi signifis la finon de la plej malsimplaj aferoj kiujn oni neniam klarigis tute, kaj neniam klarigos, kiuj estis uzablaj kaj ankaŭ senpagaj. Ekzemple, eliri kun nepoj laŭ Promenejo de Moleo — konkreta teraĵo kiu navigas sur ĝardenlando— kaj haltigi siaj paŝojn antaŭ taga atako de la sunsubiĝo. La infanoj aŭdis, ke neniu muzeo —eĉ se oni vidus ilin ĉiuj mujltfoje— havis portreton tian, kian ĉiutage pentriĝis en la horizonta tolo, el kie disiris koloroj, trajtoj, profundoj, strukturaĵoj kaj spiroj sufiĉaj, iritaj el gratulinta sed neniel arbitra belo de la naturo, kiu fundamentigis la volon daŭrigi antaŭen...

Tiel, kiel pri arboj. Li diris al geknaboj —ja provizitaj pere de dolĉaĵoj elirintaj la profundon de sia tipa palto—, ke nenie estis katedralo (eĉ ne tiu de Murcia), malgraŭ siaj trezoroj ene de siaj muzeoj, kiu povis konkuri pri gajo, senĝeno, delikato, ekvilibro, koloro kaj geometrio kiu enhavas strukturo de simpla arbo.

Pensoj veraj, kvankam malmultoj vidas tion.

Li estis, en siaj lastaj jaroj, homo komprene uzegita, sed volante ankoraŭ eltiri lastan guton de sia sango por doni identecon al ĉio, al ĉiuj; fari el infanoj, ekzemple, la plej perfektajn kunparolantojn pure validaj... Estis drinkinta nia apostolo je la fonto de la vivo. Vio- lo kiu denove ludis en brilaj flankoj. *Familia*, kiun patriarkigis li; estante la kerna figuro de multaj posteuloj kiuj vidis ĉe li aldonon de atingoj rezervitaj al homa esto. *Profesia*, unue ankrita ĉe akirado da scioj kaj poste ĉe aplikado prototipa de pioniraj projektoj en la tiama Hispanio. La *flanko esperanta*, fajre alprenita de tiuj kiuj volis antaŭe —kaj ankoraŭ klopodas— faligi la barojn kiuj malproksimigas sciojn de popoloj, kelkfoje malpace; armitaj de pintlancoj de parolaj naciismoj kaj gramatikoj starigitaj kiel armiloj kiujn oni ĵetas al aliulo kun la malriĉa merito atingi ĝin. Li havis ankaŭ la flankon *homaraman* de tiu, kiu legis kaj konversaciis; je la dorso de lia irado por kulturo kaj lernadoj kiujn trinkitaj fontoj donis al li. Kaj Naturo, lia eterna platformo, mane de alia giganto de la amo al liberaj spacoj, verdaj kaj populitaj de arboj, la nemezurebla aŭtoro de *Leaves of Grass* (folioj de herbo), Walt Whitman, kiu, kiel li, okupiĝis pri tio, kio svarmas en la vesparo de la homa sento; li



demandis al si pri helpo kiun oni povis doni al reĝo de kreado; kiel alprok-simiĝi al homa koro, por kio estis tiom da vojoj kiom espero da metitaj je la fino de la ŝoseo. Pri tio sciis multe lia nepo Johano, la inventisto de aŭtogiro, ĉiun fojon kiam sia patro, la kvinfoja ministro De la Cierva y Peñafiel, penis flankigi sian atenton al jura scienco, anstataŭ havi la vidon ĉiam pendante de la ĉielo; vidante movojn de tiu artefaraĵo kiu iam eknomiĝis aŭtogiron.

La avo estis firma aliancito de sia nepo, kiu rifuĝis sub la larĝa avo ombro protekta tiam, kiam li bezonis ripozon por lia mensa invento. Pri Ricardo Codorníu ne vane la amiko kaj miranto Azorín diris la plej belon kaj difinon kiun biografio povas enhavi: ke *li estas malnova kverko, centjara kverko kun frondo plena de birdetoj...* Tio kaj la versoj kiujn li verkis je la morto de la *Malnova Arbarulo* atestas, sendube, estimon kaj konsideron, kiuj majstro Azorín donis ĉiam al la ekzempla figuro de la Apostolo de la Arbo.

Sed kie trovi la fontojn de lia kvazaŭmilita irado laŭ la vivo, malfarante malbonaĵojn tiel, kiel *Don Quijote de España*? El kiuj prauloj venas lia nefatigebla celo por bonfari sen rigardi plie? Ĉu eble

el la varma sango kaj influo kiu enhavis lia avo Miguel Andrés?

Miguel Andrés Stárico, avo patrina, estis fabela persono. Kelkaj el liaj financaj kaj politikaj agoj povus esti premintaj sian nepon, sed tiu ĉi lasta ne volis imiti lin je la altaj financoj; kaj ankaŭ oni ne memoras, ke la nepo devenas el granda aĉetanto pri Naciaj Posedaĵoj el la fama *Malamortizo de Mendizábal*, kies amiko estis Miguel Andrés.

La infano naskiĝis en Kartaĥeno antaŭ 150 jaroj, kaj li vivis ene de forta religiemo kiu venas el sia patrino, Karmen', por kiu — ankoraŭ tre malgranda— li verkas naŭtagapreĝon versan. Sed tiu naŭtagapreĝo estis verkita pro amo al patrino, sed la lastajn stancojn li verkis pro vera amo al literaturo.

Juna Ricardo havis infanecon markita de religiemo kaj studo, bazoj kiuj ne nur ne malfortiĝos, sed kiuj fortiĝos laŭ la paŝo de jaroj, ekhavante prak-tikajn formojn por helpi la aliulojn, kiel frukto de lia agnoskita sindoneco. Malvidita sindoneco, sennoma, tiel kiel mano ne scias tion, kion la alia mano faras, emo kulturita tiel nature en sia hejmo kune kun floroj kiuj kreskis en la korto de malnova monaĥejo franciskana, kie li loĝis.



Influo el alia avo sur lia vivo estis ankaŭ granda. Manuel Codorníu Ferreras, naskita en Esparraguera (Barcelono) estas, ĉiel, kraktero de



Pío Baroña (Baroja). Lia vivo estis baroña, kaj la plumo de B a r o j a

promenas ege laŭ incidentoj el lia vivo kiu —resume— estas senfina ŝanĝo de scenoj: Cádiz, Meksiko, kaj ekzilo en Francio estas la tripiedo kiu entenis liajn sopirojn al vivo. Vive-mo kiu ho-diaŭ faras lin prekursoro de Sociala Sekureco kaj fondinton de gilda organizado de hispanaj kuracistoj, plue kontribuante per savo de multe da vivoj, kaj ankaŭ kunfondis, kune kun Hernández Morejón kaj Capdevila, la armean hispanan kuracasciencon.

Manuel Codorníu eniris historion pro savi el flava febro la soldatojn kiuj estis en Cádiz atendante la ordon por eliri al Ameriko, kiu sufokis —aŭ almenaŭ kontrolis— sendependisman fajrojn kiuj finfine ne haltis ĝis rompo de la malnova imperio po sendependajn ŝtatojn.

Post kiam li savis ilin, Codorníu iras al Meksiko, kiun li trovas solenan kaj malvarmetan tagon, kiam la nacio de aglo kaj serpento sur nopalo sendependiĝas el Hispanio, fakto kiu okazas inter ĝojo por kelkoj kaj traŭmo por alioj, unuigitaĵaj ĉiuj de la certo, ke ne estas malantaŭan marŝon.

Sendube Ricardo Codorníu estis alitirita de siaj avoj, de ilia socia graveco, de ilia graveco financa, scienca kaj ĉiam homeca.

Ricardo Codorníu estas persono naskita de la murcia senso por vivo kaj edukita en preceptoj de amo al ĉiutageco kiel rezulto de kutimoj kelkfoje praecaj, ne forgesante, ke lia rigardo ĉiam estis kelkajn kilometrojn pli antaŭe ol tio, kio estis ordinara siatempe. Tio permesis al li havi sian menson pretigita por akiri tiujn sciojn kiuj faris lin novigi en la kampo de sia profesio, de montara inĝeniero, kaj ankaŭ priatenti la evolustaton de multaj fakoj de scio, pri kiuj li estis pasie allogita.

Jen ekzemplo de lia nelacigebla genio: kiam li estis 70-jaraĝa, jam farinte —laŭŝajne— sian vivon, li decidis, ke sia rudimenta angla scipovo —lingvo kiun li akiris preskaŭ osmoze per legado de fakaj magazinoj— ne sufiĉas kaj lernas la lingvon de Ŝekspiro, kio aldoniĝas al siaj scioj pri la germana kaj la franca, iloj kiujn li bezonas por scii pri kio oni parolas en prelegoj kaj kiun ideon li devas fari operativa, ĉar nia *Apostolo de la Arbo* estas, pri ĉi tio, teknikisto pri praktikaj sintenoj, kies celo estas aplikado de tio, kio svarmas en sia cerbo.

En la mondo de kompaktaj kaj brilaj flankoj kiujn ebligis kunveni ĉirkaŭ sia figuro kaj eco, Codorníu estis per si mem, ekzemplo pri murciismo. Oni komprenu, ke

ankaŭ kartañenismo, ĉar ambaŭ urboj kaj siaj koncernaj ĉirkaŭaĵoj konsistigis lian pasintecon, kaj ofte li menciis ilin, neniam renoncante al loko kiu, laŭ sia kriterio, devis okupi Murcia en la konkordo de hispanaj regionoj, kaj eĉ de fremdaj regionoj kiuj volis konkurenci pri brilo de siaj legomkampoj, siaj kutimoj kaj tiu aparta sinteno pri la mondo kiu tiu ĉi lando ofertas.

Vere, li ĉiam sinsentis murciano, kaj sia diro kaj skribo elirinta liaj mano kaj lipoj atestas ege tiel. Li estis profunde homema, en rilato kun infanoj kiuj memoras figuro pri tiuj ĉirkaŭ Sia Majstro. Li certe havis dian paciencon por malligi al siaj nepoj el ŝancelitaj paŝoj kiuj je la fino destino farigis lin laŭ tiu glata Moleo, kiu tiam —kiel nun— eniris la legomteron tiel, kiel terlango kiu enmetas sin ĉe la verda koro de siaj arboj... Denove en la Moleo, sen eblo por promeni de fino al fino, tiel, kiel li faris antaŭ kelke da monatoj, ĉar nur pere de astralaj vojaĝoj li povis viziti Espuĉa-n, aŭ tien, kien lia menso volis... Li decidis sindediĉi al ĉiuj siaj genepoj per fabeloj. Ili ĉiuj faris libron, **La dekdu arboj**, kiu estis resumo de sia mora filozofio kaj socia evento, kiu rakontas tion, kio okazas aŭ malokazas —laŭ okaze—, pro ne alveno aŭ preterpaso, ĉiam en malfacila tasko de harmonio; pro izoligo, tiel kiel arboforme, kiel homoforme; danĝeroj aŭ bonoj kiuj venas el labori teame kiam necesas; vivi je la marbordo, je la montsupro, en

malmulte da spaco, en multe... Jen tuta vidgamo, sindona pri plurecoj al kiuj oni devas alfronti.

Estas etera Codorniu. Estas Codorniu kiu ne dorseniras antaŭ la senfinan spacon kaj malfinon de neantaŭvidita laboro kiu ne havas alian malon ol la ĉielon. Estas la Codorniu asketa: tiu, kiu —kune kun Baldomero— parkuras ĝis fatio rea la dorson de Espuĉa; la deklivojn kaj klinojn bezonante la perditan verdon. Estas la Codorniu kiu okulsignas la pejzaĝon kaj ricevas la ĉiam gratulantan respondon de tia ondo kiu ne sole plibonigas la homan vivon —arboj, birdoj, montoj, sed ankaŭ ebligas ĝin en sia plej profunda esto. Estas tiu Codorniu kiu scias, ke li estas klavo per si mem, venkinta de antaŭ tempo senzorgon, senlaboremon, seninterizon antaŭ aliula neceso... Estas tiu alia vojo kiun iradas la Malnova Arbarulon por solvo al malgajo de multaj, kio larĝigas pli kaj pli lian animon kiam lian solvon venas. Codorniu kiu vivas en la ĉielo, tia ĉielo kiun li montris al nepoj en sia vera esenco de senmorteco—, tiel, kiel publikigo de la *plua tio*, la signo, publikigo plej evidentigas, ke estas io post la baro de nuboj kaj steloj.

Ja estas io: estas la homo malantaŭe. Homo al kiu oni devas gvidi la paŝojn kiam ĝi ne havas ankrojn por iri aŭ memoro malfortiĝas pri tio, kio estis je la komenco, sen scio al kio kondutas tion, kion li komprenis aŭ lerni suferi


multon pri lia irado laŭ la Tero. Estas tiam, kiam ekestas la figuro de nia homo, ekstarante inter la ceteruloj.

Hodiaŭ pli ol neniam, 73 jarojn post lia morto, la bildo de Codorniu kaj siaj samideanoj, kiuj zorgis pri la medio kiam ankoraŭ mankis truoj en la ozona tavolo, nek acida pluvo mortigis arbarojn, nek amasa produktado de papero malaperigis arbaron subite, tiam lia bildo estas pli difinita. Oni demandas la pasinton, oni eltiras ĝiajn faktojn, kaj oni demandas al kiu ĉielo oni sendos liajn kriojn, se li rigardus la mediajn malbonojn kiuj kunvivas kun ni ĉiutage...

Preskaŭ de-truante tion, kio ankoraŭ restas –multo aŭ mal-multo, homo ĉi-taga komencas ekvidi —malvarmete, timante scii kaj tiam devante rimedi ĝin—, ke ne eblas malpurigi plu; ke ne eblas malvidi dum pli da tempo, ke tio, kion ni lasos ne al la nepoj, sed al la filoj aŭ eĉ al ni mem, povas esti nur senkulturejo, unuformigante tion, kio estis plura, sed nun havas stigmojn komunajn al dezerto. Neniam malfruas, tamen. Nek estas tempo por apokalipso, nek bedaŭri pri homaro senzorganta kiu lulas kaj dormas kun konscienco rajtigita pere de *Dio solvos...* Kompreneble, Dio

solvos!, sed ĉu ni devos helpi Dion?

Hodiaŭ registaroj komencas efi demandojn de siaj elektintoj, kaj tio, kion ili ne volis aŭdi pro insulto aŭ sento, ili nun komprenas laŭ la vojo de balotoj. Se konscienco pri la medio ne estus malferminta sian vojon pene per balotoj, ne estus naskinta la klamaoro nova favore al medio natura kiu kmencas dikigi la muĝadon de kreskanta nombro de gorgoj...



Multe rilatas al infanoj radikaj ŝanĝoj kiuj efektivigis en lernejoj por ke ili e l s e n d o s civitanojn malaltklasajn sed ri-ĉaj je sonĝoj, potence kaj, ankaŭ pose-dantajn ko-nojn pri la medio kiu ĉiam mankos al siaj gepatroj, kiuj estas skulptitaj ene de la plej katastrofa malscio pri la signifo de arbo aŭ respekto pri bestoj kiuj ĉirkaŭas ilin.

Danke al ili, al tiuj *frenezuloj malaltklasaj*, kiel Juan Manuel Serrat nomis ilin, al tiuj kreitaĵoj kies plej bona virto estas esti novaj, la mesaĝo labore enpuŝita de Codorniu kaj amantoj de Naturo, hodiaŭaj Whitman-uloj, Thoreau-uloj... Ĉiuj, kiuj ĉirkaŭbraumis sin en arbaro, entenante vidadon, ĉirkaibrakante arbon, aŭ kiuj vidis kuri akvojn ene de rivereto, ili ĉiuj

formas la armeon de novaj humanistoj. Ankoraŭ ili restas miksitaj: estas politikistoj (domaĝe!), esploristoj, instruistoj pri gimnastiko, fuĝintoj de justeco, doktoroj pri pluraj sciencoj, malteranoj, esperantistoj (ne konfuzu), dommastrinoj, ciklistoj, ĵurnalistoj (Dio savu nin!), rivergvidistoj kaj multaj aliuloj interesitaj defendi la kaŭzon aŭ servi sin per ĝi.

Kaj mi finas, dirante, ke tempo malkunigos la grejnon disde la pajlo: jaroj metos ĉiun en sian lokon, kiel ĉiam okazis, kvankam la rekompenco estos en la pretrevivo, kaj tiu ĉi grandega fluo, ekumena kaj transcenda kiu serioze celas savi nin —kaj savi nin estas savi arbarojn, monton, naturan rezervon kaj aeron kiu ni spiras, sed ne la malpuraĵon kiun ni enspiras— antaŭeniros tiel nature kiel la murcia Moleo, kelkajn paŝojn preter la domo de Codorníu, la *Malnova Arbarulo* por iuj, la *Apostolo de la Arbo* por ĉiuj, li lasos sian fortan kaj pezan manon sur via ŝultro, feliĉa ĉar vi kaptis sian mesaĝon. Rekompence li instruos vin, ree, la egan sunmalleviĝon kiu imperias sur la legomtero origante oranĝojn kaj briligante citronojn. Ekzakte la impresoj kiujn kunanto de Codorníu prenos en sian bruston. Ĉar la pasinto estas bieno de ostepo, kaj tiusence Ricardo Codorníu, pli ol siajn instruojn pasintajn, lernigas al ni, ke la mon-

do, negravante siajn inertojn, eblas ŝanĝi.

9 MUZIKA DEKLAMADO DE POEMOJ

Post la prelego, ni ĝuis poeman deklamadon de Inma Martín en la hispana, kaj ankaŭ en Esperanto. La poemaro aŭskultita estis jene:

- 1 El secreto de mi vida.
- 2 Atraque.



- 3 Ĉio estas ĥaoso.
- 4 Se equivocó la paloma.
- 5 Soledades (Antonjo Maĉado).
- 6 ¿Realidad o sueño?
- 7 Vicente Medina:
 - I Es cosa que se ve.
 - II Cansera.
 - III Los oasis de Murcia.
- 8 Nana (je la 50^a datreveno de la morto de Manuel de Falla).
- 9 Las nanas de la cebolla (Miguel Hernández).
- 10 ¡Por fin, pastor! (M. Hernández).
- 11 Elegía a Ramón Sijé.
- 12 Romance de la Luna, el la *Romancero Gitano* (Romancaro cigana, de Federico



García Lorca).

13 Alfonsina Estorniu:

- a) Voy a dormir (poema antes de morir).
- b) Canción.
- c) Tú me quieres alba.

14 Vámonos p'allá...

Post la deklamado, kelkaj samideanoj ankaŭ deklamis siajn poemojn, kaj ni finigis la akton kantante *La Espero*. Tamen, estis ankoraŭa poemo deklamata de Inma, *La rama*, de Octavio Paz.

La dimanĉon 14an de julio 1996

10 HISPANA PAROLADO:

Paroli Esperanto, por kio?

Fernando Onsalo estas nova esperantisto kaj profesoro pri teknologio ĉe lernejo de Murcia. Li preparis prelegon rilate al la problemaro de Esperanto kiel pontaj lingvo en la moderna hodiaŭa mondo, kiu li diris je la 11-a horo. Mia persona juĝo pri ĝi estas, ke la prelego iomete naivas pri Esperanto, pri la moderna mondo kaj pri la nuna teknologio. Por ke vi kunsentu aŭ malkunsentu pri mia tute subjektiva opinio, mi aldonas esperantan tradukon de la prelego:

a) *Enkonduko.* La celo de mia parolo estas esprimi mian opinion pri kion mi scias rilate la provoj disvastigi Eperanton en Hispanio kaj en la cetero de la mondo, kaj la maniero por atingi tiun disvastigon alivoje.

b) *Esperanto, lingvoj kaj mi.*-Komunikado inter loĝantoj de diversaj partoj de la mondo, pere de iliaj malsimilaj lingvoj, estas sociologia transcenda fenomeno ĉe la etoso de interlandaj rilatoj. Kiam mi abiturientis, mi studis la latinan, la francan, kaj laŭvole, la anglan. Tiam tiu ĉi komencis invadi la grundon kiun la franca estis okupanta kiel **utilan lingvon**. Tiutempe mi eme scivolis koni tion, kio okazis alilande, kion homoj faris, kaj kion ili pensis. Bezonis ligvojn, sed kiom da ili?, kiuj?

Antaŭ sep jaroj mi atentis pri la fenomeno Esperanto. Mi konstatas, ke tiu ĉi lingvo estas nekonata de la plej granda parto de la hispanoj, kaj mi kuraĝus diri, ke ankaŭ de plej parto el la homoj de la tuta mondo, kvankam pli aŭ malpli intense ni ĉiuj bezonas interkomuniki kaj interŝanĝi informadon pri temoj rilataj al scienco, teknologio, ekonomio, turismo, politiko, juro, senokupeco, ktp.

Nun en okcidento, de duonjarcento natura lingvo ege ĉefrolas la uzon kiel lingvon interŝanĝan, pontan, aŭ kiel vi volas nomi ĝin: la angla. La potenco kaj influo de tiu ĉi lingvo estas sekvo de la disvolvo ekonomia, scienca, milita kaj teknologia de du landoj: Britio kaj Usono.

Antaŭ tridek aŭ kvardek jaroj, la plej disvolvigitaj regionoj de Norda Hispanio ricevis la influon de Francio. Tial lernantoj tiamaj penis lerni la francan ĉe niaj lernejoj. Nun lernado de la franca en Hispanio komencas esti ion danĝere anekdota. Instruistoj pri la franca havas nur tre malmultajn lernantojn en siaj

klasoj, eĉ nur unu... *Ĝi estas pli facila, sed malpli utila...*, la lernantoj diras.

c) *La bezonata revo, internacia lingvo.*-Profesoro Ivo Lapenna instruis Internacian Publikan Juron kaj Historion de Diplomatio ĉe la Universitato de Zagreb. Li prelegis pri Komparita Juro (Soveta kaj Orienteŭropa) en la *Londona Lernejo pri Politikaj kaj Ekonomiaj Sciencoj*. Escon li verkis estas *La lingva problemo en internaciaj rilatoj*. Traktas ĝi pri la problemaro kiu aperas kiam du diverslingvaj popoloj sentas bezonon establi interrilatojn. En ĉi tiu verko abundas konitaĵojn historiajn rilate al problemoj komunikaj, kaj oni povas eltiri konkludojn el la faktoj kiujn Dr-o Lapenna montras. Ni ekvidu ilin:

De komence, la popoloj interkompreniĝis pere de gestoj, same kiel kutime hodiaŭ, je la fino de la XX-a jarcento, du diverslingvaj honoj renkontas. Oni ne progresas multe ĉi tiel.

Laŭ la historio multajn lingvojn oni uzis kiel interilo, kompreneble ili ĉiuj estis etnaj. Tiuj lingvoj korespondas al diversaj periodoj de mastreco kaj koloniado fare de popoloj kiuj uzis ilin kiel proprajn. La ĥina kulturo disvastiĝis pere de skribado konita de la 15-a jarcento antaŭ Kristo. Poste venis la greka lingvo. Sekvis la latina dum multaj centjaroj. La araba kovris la multaj jaroj kiam ĝin parolis kultura kaj milita potenco. Las turka lasis spuron ĉe la Balkanoj. Nune, en Eŭropo kaj Ameriko notendas lingvoj hispana, angla, franca, germana, itala rusa, kaj kelkaj pli.



Loĝantoj kaj politikistoj de kelkaj landoj ankoraŭ penas por ke oni traduku alies lingvojn el la ilia. Ili demandas sin: *kial nia lingvo devas gravi malpli ol alies?*

Se oni analizas la nunan Eŭropan Unuiĝon formiĝantan, supozante nur dekkvin landojn kaj dekdu lingvojn, oni povus formi pli ol cent eblajn kombinaĵojn. Ĉe konferencoj, debatoj, resolucioj, kaj tiel plu, devus esti svedoj kiuj mastras la portugalan, kaj portugaloj kiuj mastras la svedan, sed ankaŭ grekoj kiu mastras la nederlandan. La problemon oni divenas nefinebla. Se oni decidus starigi pontan lingvon, la anglan ekzemple, tio ne feliĉigus la francojn, kiuj kunfondis la Unuiĝon. Ni estas same kiel je la komenco de historio, kvankam kun la malavantaĝo, ke almenaŭ la civitanoj el la plej riĉaj landoj el la Tero, ĉar ili havas pli ŝancojn por interrilati, ni povas altrudi al la cetera mondo la du aŭ tri lingvojn kiuj gravas al ni.

Kvankam ĝi estus nur pro merkata intereso, necesas direkti la rigardon al la miloj da milionoj da loĝantoj de Ĥinio, Bharato, kaj tiel plu, al la graveco de ekonomio rusa, tiel malbone ekspluatata, kun malsimila alfabeto, al la konkuranta teknologio kaj forpenetremaj merkatoj de landoj orientaj kiel Japanio, Koreio, Tajvano, Malajsio, kaj aliaj, ankaŭ uzante malsimplajn skribajn sistemojn...

Jam en 1917 E. Staw diris: *Estas kompreneble, ke homo kiu parolas kaj skribas sian lingvon povas diri ĉion ajn, dum se uzante alies lingvo, ĝi povas diri nur tion, kio siaj konoj ĝin kapabligas..*

Ivo Lapenna mem, analizante la psikologian aspekton kiun enhavas la uzo de stranga lingvo, diras: *ne estas iu kiu ne sentas sin iomete ligita kiam li parolas aŭ skribas strangan lingvon. Ju pli klera li estas, des pli li havas tiun senson de lingva malpliigo..., je internaciaj kongresoj kutime okazas, ke iu ajn delegito ŝatus diri ion, sed ĉar li ne regas la oficialan lingvon, li preferas silenti.*

Inter tiuj, kiuj pensis pri la utileco de ekzisto de internacia lingvo ni citos la jenajn:

1 **Juan Luis Vives**, kiu diris en 1532, ke *estus bonega la ekzisto de ununura lingvo, kiun ĉiu popolo povus uzi... La lingvo latina mortos, kaj tiam estos granda konfuzo.*

2 **Renato Descartes** diris en 1629: *estas multe da homoj kiuj ĝue oferus kvin aŭ ses tagojn de sia libertempo por povi komprenigi sin de ĉiuj homoj..., mi kuraĝus esperi universalan lingvon, tre facilan por prononci, lerni kaj skribi...*

3 **Jean Marie Arouet, Voltaire**: *hodiaŭ loĝanto de Bergamo, Italio, kiu vojaĝas laŭ malgrandaj kantonj svisaj, kiun nur monteto disigas, bezonas interpretisto kvazaŭ li estus en Ĥinio...*

Sekvo de ĉi-tiuj diroj kaj pensoj pri la bono esti internacia lingvo estas la pli ol tri cent projektoj verkitaj de homoj de multaj landoj laŭ la lastaj jarcentoj. Menciinda estas la lingvo Volapük, de la pastro germana Martino Ŝlajer [Schleyer], (aperinta en 1879). Post dek jaroj disvastiĝis ege, estante preskaŭ tri

cent asocioj kaj dudek kvin ĵurnaloj, kaj ankaŭ kelkaj dekduoj da libroj verkitaj volapuke. Kelkaj cirkonstancoj, inter ili la apero de Esperanto en 1887, kaŭzis ĝian malvastiĝon kaj malaperon.

d) *La unua jarcento de Esperanto.* Je 1859 naskiĝis la kreinto de Esperanto, Lazaro Ludoviko Zamenhoff (1859-1917) en Bialystok, urbo subpremita de la cara reĝimo kaj sekvo de konfliktoj kaŭzitaj de diversaj gentoj, lingvoj kaj religioj kiuj kunekzistis tie. Esperanto komencas disvastiĝi ekde 1907, venkante obstaklojn al sia disvastiĝado kaj disvolviĝo kaŭzitaj, inter aliaj, pro la eksplodo de la Du Mondaj Militoj.

De tiam, esperantistoj de la tuta mondo informas nin pri atingoj rilate al la disvolviĝo, disvastiĝo kaj akcepto de ĉi tiu artefarita idiomo. El la konitaĵoj eligitaj el la verkoj de Ivo Lapenna, datumitaj je 1972, mi konigos al vi la sekvontajn:

Instruado: je 1964 ekzistis pli ol du mil lernolibrojn de Esperanto en pli ol kvin dek lingvoj. Je la lernajaro 1968/9 oni instruis ĝin ĉe 543 lernejoj el 31 landoj. Estas katedroj de Esperanto en dudeko da universitatoj, kaj lernejoj en landoj kiel Anglio, Germanio, Usono, Koreio, Italio, kaj tiel plu. En la Universitato de La Laguna —Hispanio— ekzistis katedro de Esperanto.

Literaturo: en Londono la Brita Asocio de Esperanto havas libraro de pli ol 33000 titoloj, libroj verkitaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton.

Scienco kaj tekniko: estas deklaro de kvardek membroj de la Akademio Franca de Sciencoj de 1924 kiu ĝuste taksis

la valoron de Esperanto. Ankaŭ estas manifesto de 85 japanaj sciencistoj en 1950, kaj resolucio de sciencistoj ĥinaj en 1951. Estas tradukoj en Esperanton de verkoj de Konfucio, Leibnizo, Kant, Descartes, Lasalle, Marks, Engels, Lenin, kaj tiel plu.

Vortaroj kaj terminaroj: ĝis 1972 oni konis pli ol 160 vortarojn pri 50 fakoj kiel filozofio, scienco, tekniko, gildoj kaj profesioj. La enciklopedio Espasa, de Hispanio, enhavas kelkajn tradukojn de la terminoj kiujn ĝi difinas, inter ili estas la esperanta. Eble ne ĉiu hispano scias tion. Oni devas diri ĝin.

Ĵurnaloj kaj magazinoj: estas multaj en preskaŭ ĉiuj landoj el la mondo. La revuo *Esperanto* havas abonantojn el 89 landoj.

Esperantaj organizaĵoj: la plej grava estas la Universala Esperanta Asocio.

Delegita reto: en 1971 estis pli ol 3500 en la mondo, distribuitaj en 66 landoj. Estas delegitoj fakaj, ĉiu el ili estas specialisto pri fako kiel edukado, medicino, ekonomio, ktp. La delegito estas homo kiu parolas Esperanton kaj apartenas al la Universala Esperanto Asocio kiu promesas plenumi senpage kelkajn servojn, laŭ la regularo de la asocio. Apartan signifon mi klarigos poste pri la *senpageco* de la servoj.

Kongreso Universala de Esperanto. En 1993 ĝi estis en Hispanio. Ankaŭ, estas fakaj internaciaj kongresoj, kiel sciencaj, kuracistaj, juraj, blindulaj, kaj tiel plu.

Komerco kaj industrio: en la sesdekaj jaroj ekzistis firmaoj aviadilaj kiuj uzis Esperanton por siaj internaciaj komercaj

rilatoj. Kelkaj gravaj firmaoj kaj organizaĵoj, inter ili bankoj, fervojoj, elektronikaj, aŭtomobilaj, internaciaj foiroj, ktp, uzas Esperanton. Nun mi volas demandi: Ĉu ekzistas en 1996, en la mondo, firmaoj kiuj rilatas inter si pere de Esperanto? Bonvolu respondi min poste.

Turismaj libretoj kaj gvidiloj: estas pli ol 700 urboj kaj landoj kiuj eldonas pli ol mil kvincent en la mondo: Danio, Islando, Japanio, Hispanio, Francio, Germanio, Parizo, Londono, Romo, ktp, estas menciindaj ekzemploj.

Telekomunikado: je 1922 komenciĝis elsendoj radiaj en Esperanto en landoj kaj urboj kiel Usono, Londono, Moskvo, Ĝenevo, Helsinko, ktp. En 1972 havis programojn en Esperanto urboj kiel Varsovio, Romo, Pekino, Berno, Vieno, kaj tiel plu.

Poŝtaj stampiloj: oni elsendis oficialajn stampilojn kun tekstoj en Esperanto. En 1925 la Internacia Telegrafa Unio sekvis la rekomendon de la Ligo de Nacioj, agnoskante Esperanton kiel “klaran lingvon” por telegrafaj komunikadoj.

e) **Internaciaj organizoj agnoskis la gravecon de Esperanto.** La Ligo de Nacioj faris tion je 1922.

En 1950 oni solene donis al la Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj peton favoran al la Internacia Lingvo subskribita de preskaŭ kvin cent organizaĵoj kun pli ol dek kvin milionoj da anoj kaj unu miliono da homoj el sepdek ses landoj. Inter la signantoj individuaj estis prezidanto de respubliko, registarestroj, anoj de parlamentoj, filologoj, lingvaj instruistoj, ĵurnalistoj,

kuracistoj, juristoj, inĝenieroj, farmaciistoj, konstruistoj, komercistoj, militistoj, kaj tiel plu.

f) **Kaj en 1996..., kio?** Ĝis tiam, ĝis 1972, ni havas resumitan vidon pri la vojo de Esperanto laŭ sia historio. La vido estas bazita sur konitaĵoj kiuj akceptas ĉiun analizon. Malpli ol jarcento, se ni haltas je 1972, sed pli ol jarcento se oni agnoskas, ke tiujn ciferojn oni diskonigas je la dua duono de 1996.

Kiom Esperanto antaŭeniris dum tiu longa jarcento! Kia grava malkovro! Kiom da homoj interesiĝintaj en la afero! Sed aliflanke, ne estas kredeble, ke malgraŭ ĉiuj faritaj penoj dum tiom da jaroj por disvastigi tiel gravan aferon en tiom da landoj en la mondo, oni neniam vidis eĉ manlibron por elektra borilo, nek por doma video, ekzemple, verkita en Esperanto, dum en Hispanio tiujn ĉi librojn verkitajn en Tajvano, Japanio, Koreio, ktp, oni povas legi en ok aŭ eble en dek lingvoj, inter kiuj neniam estas Esperanto.

Ti ĉi estas realo kiu neas ĉiun optimismon kiu povus veni el tio, kion mi antaŭe diris pri la progreso de Esperanto dum iom pli ol jarcento da ekzisto.

g) *Ĉu oni ofertis la produkton taŭĝe?* Oni vidas ĉion rilate al Esperanto kiel demandan kaj kritikan turon, sed ne foran. Mi rigardadas ĉiun informfonton pri tiu movado, kaj ĉian iniciatojn or disvastigo kaj uzo de la lingvo Esperanto. Tamen, multajn eventojn mi ne rimarkis. Ŝajnas, ke la sanktuloj —se estas tiuj— de la esperanta movado proklamus solene *bezonas disvastigi la fenomenon esperantan laŭ la tersurfaco,*

kaj tuj ili aldonus *jes, sed nur iomete.* La disvastigaj kanaloj uzitaj en la unua epoko eble taŭĝis. Kompreneble tiuj uzataj nun ne jam taŭĝas, se la celoj estas tiuj, kiuj mi opinias.

h) *Lingvo angla.* Laŭ mia kono, ne ekzistas, kaj neniam ekzistis, iu *angla movado* kiu batalis por la disvastigo de la angla lingvo. Ne necesas.

Se ni volas disvastigon de Esperanto simile al tiu de la angla, ni ekmitu!

i) *Kiel?* Post mi demandis kelkajn instruistojn pri hispanaj lingvo kaj literaturo, kaj la angla lingvo, pri la opinio kiun ili havas pri Esperanto, mi konkludis, ke ilia scio ĉitema estas praktike nula.

Aliflanke, ni pensu pri sloganoj ĉe hispana televido: **con air bag seria..., made for you**, ktp. Eble la reklamiloj esperantaj ĝenu malpli...

j) *Eksteraj signoj de Esperanto.* Kiu alproksimiĝas al Esperanto, ĝin perceptas tra signaro kiuj povas ŝoki lin.

Multe da skriba materialo pri Esperanto (libroj, revuoj, bultenoj, lernolibroj, vortaroj...) venas ĉefe de UEA. Ĝia aspekto, kvalita papero kaj tipografia, grafikaĵoj (malmutaj) aparta odoro, ktp, memorigas al ni la librojn kiujn oni uzis en publikaj lernejoj hispanaj je la jaroj kvardekaj kaj kvindekaj. Multe da propagandiloj de esperantaj asocioj donas bildojn kiu memorigas aspekte broŝurojn kaj oktetojn kaj alvokojn al movado kaj kontraŭbatalo, kiel tiuj kiujn revoluciaj kaŝitaj movadoj organizis kiam Eŭropo pretigis la militon. Ankaŭ estas homoj kiuj perceptas ian etoson de

francmasona kunvenejo ĉe ĉi tiuj modoj kaj stiloj de disvastigo.

La Esperantismo havas signon, flagon. Ankaŭ kristianismo, naziismo kaj komunismo havas ilin.

La Esperantismo havas **himnon**, kun vortoj en Esperanto kaj muzikon. Nacioj, organizoj politikaj kaj religiaj ankaŭ havas ĝin.

Esperantistoj proklamas Esperanton kiel universalan lingvon de paco, solidareco, unueco, amikeco, neŭtraleco, amo, egaleco, ekologiismo, homa helpo, rilatoj inter popoloj mondaj, kaj tiel plu. Universalismaj religioj estas ankaŭ por paco, solidareco, unueco, amikeco, neŭtraleco, amo, egaleco, ekologiismo, homa helpo, rilatoj inter popoloj mondaj, kaj tiel plu...

Esperantistoj kutime fieras dirante, ke siajn lingvon oni uzas eĉ por **skribi poezion**. Ankaŭ Esperanton oni rigardas kiel **idiomon kun granda beleco**.

Nu, tiuj ĉiuj **eksteraj signoj**, por kio taŭgas?, kiel utilas?, eble televidaj sloganoj en Hispanio jam komencis inkludi frazojn kiel *kun pneŭmatika saketo de serio...?, ...farita de...?*

k) Kritikaj aspektoj pri disvastigo de Esperanto. Kelkaj rimedoj uzataj por ke Esperanto disvastiĝos kaj universaliĝos ne estis efikaj. Tre ofte oni sentas, ke Esperanto estas idiomo kies unika kaj ĉefa celo estas skribi kaj paroli pri si mem. Oni povus diri, ke Esperanto rigardas sian umbilikon.

Mi neniam aŭdis ĵurnalistojn, verkistojn, politikistojn aŭ lingvistojn hispanajn tra amaskomunililoj diri eĉ

unu vorton, fari eĉ unu komenton, aludon al la lingvo Esperanto. Ankaŭ ne al profesiuloj de firmaoj kiuj sindediĉas al tradukado de tekstoj. Ankaŭ mi ne konas, se ekzistas komercajn filmojn kaj videajn produktaĵojn en originalaj versioj, subtitolitaĵoj en Esperanto.

La gradaltigo de Esperanto estas iomete malkutima rilate al argumentoj uzataj por altiri homojn al ĝia lernado. Tion oni konstatas eĉ multaj eldonaĵoj propagandaj. Sviza revuo nomita *Educateur* prezentis en 1979 artikolon pri pedagogio de Esperanto, kie ĝi diris:

La pedagogio de Esperanto, finfine, estas vera mora edukado. Kontaktojn establigitajn pere de komuna lingvo kreskiga inteligento kaj koro; ili malfermas al la servo de la homaro. Ĉie, kie Esperanton oni enkondukis, ni vidas naskiĝan atmosferon de ĝojo kaj boneco...

Oni ne komprenas kiel uzo de lingvo, kia ajn ĝi estas, povas porti popolojn al tiu stato de graco, paco kaj feliĉo senfinaj. Mi ankaŭ ne komprenas por kio taŭgas tia argumento.

En la hodiaŭaj tempoj, ne gravas multe ankaŭ la fakto, kvankam vera, ke tiu ĉi lingvo estas tre simpla kaj rapide lernebla, aŭ ke oni povas lerni ĝin senpage. Oni kontraŭdiras: sed mi neniam vidis eĉ unu solan linecon skribitan en tiu ĉi idiomo.

Ankaŭ ne utilas kontraŭmeti kaj konkurencigi la lingvon anglan kaj Esperanton. Homoj povus esti feliĉaj, se nur oni konas kaj uzas tiujn du lingvojn

kiel interŝanĝaj lingvoj. Ni scias, ke ekzistas vortarojn angla-Esperanto-angla, kaj ankaŭ tekstoj skribitaj en la angla por ke la angle-parolantoj povu lerni Esperanton.

Tial, ĉar ĉiu kiun mi diris, oni havas la senson ke Esperanto estas lingvo ke, malgraŭ ĝia longa jarcento da ekzisto, ankoraŭ ne eliris el siaj apartaj katakomboj, kaj tio estas sekvo —laŭ mia opinio— de eraraj klopodoj de gradaltigo, disvastigo, ktp, pli taŭgaj por religio aŭ sekto ol por kio ĝi fakte estas: artefarita lingvo, tre facile instruebla, lernebla kaj uzebla, kaj kun kiu oni povas paroli kaj skribi pri tio dia kaj homa, pasinta, estanta kaj ostempa, same kiel oni faras pri la ceteraj lingvoj de la popoloj de la Tero.

D) La mondo de la angla lingvo. La mondo en kiu la angla lingvo regas, ĉio malsamas. Homoj interesiĝintaj pri la angla, kaj ankaŭ tiuj por kiuj gravas ke la angla estu disvastigata, agas tute alie. Ili ne estas tiel altruismaj aŭ sindonemaj, aŭ narcisismaj, aŭ malsimplaj...

La materialoj kaj rimedoj instruaj kiujn oni uzas por lernigi la anglan renoviĝadas, moderniĝas ĉiutage kaj uzas ilojn aŭdovideblajn, informadikajn kaj telekomunikajn. Oni ankaŭ promocias ĉeestadojn en la landoj kie la lingvo estas origina, studentajn interŝanĝojn, teknikojn por frue aŭda stimiligado, aŭ stimulo de subkonscio dum dormo, kaj tiel plu.

Tamen, lernadon pri la angla neniu promocias per argumentoj rilate al lernfacileco, nek kiel ekonomia ĝi es-

tas, nek per la mallonga tempo kiun oni bezonas por lerni ĝin. La anglan oni promocias nur pere de ĝia bezono. Tio estas ĉio.

La angla lingvo ne havas himnon. Ankaŭ ne havas standardon ĝi.

La rimedoj por lerni la anglan estas malsimplaj, brilaj, luksaj, aktualigitaj, riĉaj kaj multekostaj. Malgraŭ tio, oni vendas ĝin ĉie kaj ĉiam, kaj estas uzata. Lernejoj pri angla ekzistas, subtenas sin, longdaŭras, kreskas kaj multobliĝas ĉar ili gajnas monon.

Mi neniam aŭdis, ke la angla estas la lingvo de la paco, solidareco, kaj tiel plu, kvankam ĝi estas tio, same kiel la aliaj.

Homoj kiuj studas la anglan nune, ne volas —eĉ fore— verki poemon pere de ĝi, nek traduki ĝin el aliaj lingvoj en la anglan.

Mi ne scias pri homoj kiuj por promocii la anglan uzas argumente tiujn belecon kaj harmonion kiujn oni sentas kiam ili aŭskultas ĝin.

Mi ankaŭ ne scias pri la stato de organizaĵoj naciaj aŭ internaciaj kies celo estas, ĉefe, priparoli la multajn virtojn kaj bonegojn de la angla lingvo, kaj eĉ malplie je maniero seninteresa, altruisma kaj senpaga.

Tromultokaze mi bezonis ekuzi miajn malgrandajn konojn pri la angla por ekscii la enhavon de informoj kiujn mi ricevas pri elektroniko, informadiko kaj aliaj fakoj de mia intereso. Okazis al mi la samo, kiam mi volis lerni uzi ilojn kiuj utilas por komuna uzado, kiel aŭtomata telefona respondilo, videokamero, senfadenaj aŭskultiloj, CD

kompakto-diskedaj reproduktiloj, kaj tiel plu.

Persone, mi ĉiam preferos traduki el Esperanto ol el la angla, sed mi ne havas la okazon...

La operativaj sistemoj kreitaj de la multinaciaj firmaoj informadikaj enhavas alfabeton multe pli simila al la angla ol la esperanta alfabeto, kaj tamen tiun ĉi ne ankoraŭ oni reformis.

Plej parto de la profesiuloj hispanaj kiuj rilatas al komunikmedioj klopodas lerni la anglan, precipe kiam ilia laboro igas ilin fari raportojn kaj intervjuojn en landoj kies lingvo ankaŭ ne estas la angla.

En Hispanio oni uzas la anglan tro ofte ofende kaj trouze, eĉ por iuj kiuj vivtenas sin instruante ĝin. Ni rememoru la sloganon "con **air bag** de serie..." ĉe televido. Tamen, ĝi persistas.

Al ĉiuj interesiĝantoj pri tio, ke Esperanto okupu similan lokon en la mondo kiun okupas la angla, mi kuraĝas konsili: **instruu, lernu kaj uzu Esperanton, aspirante al la samaj celoj al kiuj aspiras tiuj kiuj hodiaŭ instruas, lernas, kaj uzas la anglan.**

Eble la situacio de la esperanta movado monda estas tiu, kiu taŭgas al membroj kiuj vere bezonas malpli la uzon de Esperanto — kaj ĝenerale iun ajn idiomon ne sian— ol tiuj, kiuj jam uzas aliajn lingvojn, kiel la angla, prekaŭ ĉiutage, kaj tiu uzo gravas por sia estonto.

Tial mi opinias, ke ni devas zorgi intense kaj racie por ke Esperanto subiru al la areno en kiu mezgradaj lingvoj batalas por superregi kiel lingvoj. Tio estas la mondo de ekonomio, komerco, teknologio, scienco kaj senokupeco. Temas pri lingvo sole por lerni kaj uzi oni uzas tiel, kiel mi postulas. Por tio, necesas —mi kredas, ke nepras— ŝanĝi

la filozo-fion kaj manieron por fari tion tuŝante disvastigon de tiu artefarita idiomo.

Tial mi volas prezenti proponon kiu alproksimi-ĝas al tio, kio povus esti strategio por meti en la merkato bonon aŭ servon, Esperanton. Por tio, unue oni devas pensi en la

potenco, ĉar ĝia geografia vasteco, de la Federacioj de Esperanto en ĉiuj landoj de la mondo, kun anoj kaj partoprenantoj. Temas turnigi ilian kulturan karakteron, sen malaperigo, por plipotenci ĝin, kiel entrepreno kiu, ĉar ĝi estas tio, havas pli difinitaj celoj kaj malpli vitraj. Tra la tutaj regionoj kaj nacioj de la mondo estas firmaoj kiuj enlandigas aŭ ellandigas objektojn aŭ servojn produktitajn —aŭ ne— de ili mem. Temas pri konvinki respondeculojn, ke ili uzu Esperanton, kune kun la kutima lingvo de interŝanĝo. La estigon de la ideo oni povus ekefektivigi same kiel la aliajn. Oni oferas la produkton senpage. Oni provas du aŭ tri foje. Se interesas, oni iniciatas komercadon. Oni akordas tiujn kondiĉojn, kiel prezojn, kvaliton kaj templimojn, kaj oni laboras tiel dum ĝi funkcias. Se ne estas intereso, ĉio bona. Eble oni ne bezonas Esperanton, nek iun ajn lingvo en la regiono.

Mi volas prezenti proponon...



Alia propono estas ekstaro ĉe ĉiu landoj samtempe de CD-roma diskedo, metante ĝian enhavon ankaŭ en Internet. Tiu ĉi diskedo enhavus tion, kio estas necesa por ke parolantoj de la 200 plej disvastigitaj lingvoj (kio enhavos 90% de la enloĝantoj de la planedo) povus eklerni Esperanton. Cd-rom povas enhavi ĉirkaŭ 600 megabajtojn de informo. Tio povas esti 500 paĝa vortaro de Esperanto, kiu entenus 40.000 vortojn, kaj aliajn 200 vortarojn por ĉiu alia lingvo elektita. Ankaŭ estus gramatiko de Esperanto verkita en ĉiu el la 200 lingvoj, havante 200 paĝojn ĉiu lingvo. Tio egalus 140.000 paĝojn entute. Ankaŭ oni

povas meti la Plenan Ilustritan Vortaron, kaj sonbendojn kun prononcado de Esperanto. Por tiuj personoj kiuj ne havas Cdrom-legilon, oni povas fari kopion sur diskedo normala por komputilo. Eĉ se oni ne havas komputilon, oni povas fari kopion en papero. La produktadon de la diskedo oni devus fari ene de unu jaro aŭ malpli en ĉiuj 200 landoj kie tiuj 200 lingvoj estas parolataj.

La novaĵon por lernado kaj uzo interaktiva de la idioma en ĉiu lando estus komisiita al firmaoj fakaj pri informa-diko. La laboro alportita de ĉiu lando estus donita ene de diskedo al la firmao por traduki al CD-rom. En ĉiu

lando ekstarus firmao kun apartoj de 1000 membroj, po 5000 pesetoj. La laboro en ĉiu lando estus farita de la 20 plej regantoj de la lingvo, kiu enspeziĝus 200.000 pesetoj por sia laboro. El tiu dudeko, la laboron disdonus la plej klera en la lingvo al la aliaj 19. La CD-rom diskedojn oni povus vendi po 5000 pesetoj. Post la vendado, oni donus la gajnojn al la firmaanoj kiuj investis la monon.



200 lingvoj = 140.000 paĝoj!

Tiuj diskedoj estus ege fruktodonaj, ĉar oni povus fari tiom da *filajn disekdojn* (tio estas: kopiojn) kiel oni volas sur papero kaj magnetika diskedo. Tiujn *filojn* ankaŭ oni disvendadus. Vendpunktoj por la materialo povus esti ĉe ĉiu lando aŭ

mondregiono la tradukaj firmaoj jam cititaj.

Tiuj agoj por disvastigi kaj uzigi Esperanton donus je malmulte da tempo brilegajn rezultojn. Ili estus iniciataĵojde asocio kiu, ne volonte, obtenus ekonomikajn profitojn, sed se la afero ne progresos, estus kiel loteria bileto nepremiita, kaj kiel aventuro estas baldaŭ forgesita.

Kion neniam oni forgesus estas la artefaritan lingvon Esperanton, kiun oni daŭrigos uzante ĉe la ĉiamaj etosoĵ, same limigitaj, por tio, kion oni uzas ĝin nun; tio estas: por paroli pri Esperanto, pri frateco, pri eko-logio, paco, kaj tiel

plu; temoj pri kiuj ni ĉiuj ja scias ĉar estas multe da homoj kiuj memorigas nin ĉiutage kaj ankaŭ en nia gepatra lingvo.

Dankon.

11 POSTPAROLADO

Kiam la parolanto finis, li invitis la ĉeestantaron fari demandojn kaj klarigojn, se ni volis. Kelkaj samideanoj rifutis kelkajn faktojn kiujn Onsalo diris, kvankam li estis dirinta, ke sia informo datumis de 1972. Ankaŭ, oni gratulis la parolinton por prelegi tiamaniere antaŭ aro de esperantistoj! Oni diris al li, ke Esperanto ne estis pli *artefarita* ol la hispana aŭ la angla; ke la esperantaj signoj estas tradicie pridiskutitaj, sed neniam oni sukcesis senenriĉigi Esperanton de ili, same kiel oni ne sukcesis *deseŝiĝi* la hispanan, ke estas famaj lingvistoj kaj univesitataj profesoroj kiuj ne nur parolis bone pri Esperanto, sed kiuj eĉ ŝanĝis *publike* —pere de ĵurnaloj— sian malfavorajn juĝojn pri Esperanto. Oni diris al li ankaŭ, ke ni ne povas fari kiel la anglistoj, ĉar ili havas du objektojn kiujn ni ne havas: la britan (kaj usonan) armeo kaj la monon kiujn ili havas. Se ni havus tion, eble Esperanto jam estis disvastigita tra la tuta mondo, sed ni, esperantistoj, ne volus havi iun ajn rilaton kun Esperanto, ĉar tiuj rimedoj estas senmoralaj kaj neaplikeblaj de ni.

Estis pliaj reagoj al la parolado de Fernando Onsalo, sed mi opinias, ke mi jam diris la esenco de ili. Se ne, la legantoj povas aldoni siajn vidpunktojn en la venonta numero de *Kajeroj el la Sudo*.

12 LABORKUNVENO.

Poste, la prezidanto de HEF, S^{ro} **Antonio Alonso Núñez**, prelegis pri kelkaj

atingoj de Esperanto kaj esperantistoj dum la jaro kuranta.

Antaŭ lia komenco, oni demandis, ĉu la prelego devos esti dirita hispane aŭ esperante. Oni balotis, kaj nur du samideanoj volis, ke ĝi hispaniĝu. Sekve, la Prezidanto prelegis en Esperanto pri la *paŝoj al Universitata nivelo*, klarigante, ke ne ĉiu taŭgas por instrui ĉe universitato.

Resume, li diris, ke:

1. Ĉe Valencio ĉiu kiu faras esperantan kurson ricevas 2 kreditojn.
2. La Nobelpremiito Reindhardt Selten venis al Murcia kaj ankaŭ al Santiago de Compostela.
3. Somerkurso en Santiago. John Wells iros kaj prelegos pri *Ĉu ŝerco aŭ serioza afero ĉe la universitato?* La pre-universitata esperanta kurso komenciĝos la venontan someron.
4. Samideano Alonso Núñez ankaŭ priskribis resume la revoluciojn pri la homa komunikado, kiuj estas jene:

- 1 Alfabeto.
- 2 Decimalaj nombroj.
- 3 Metra decimala sistemo.
4. Esperanto.
6. Informadiko.

Je la fino de tiu interesa prelego, *iu samideano Jesuo de las Heras* petis permeson de la estantaro legi parton de la prelego dirita de Zamenhof en Sankta Peterburgo je la Rusa Kongreso okzinta en 1910, kaj post akcepto de ĉiuj, li legis la faman dokumenton **Pri la neceso**



paroli Esperanton. Sekvis debato pri la nuanco, ke Zamenhof ne diris *nur en Esperanto*, sed finfine la plimulto asertis, ke oni parolas Esperanton en esperantaj kongresoj, kaj la problemoj por kunantoj ne esperantistaj ne devus gravi pli ol la neceso paroli en Esperanto. Aŭ almenaŭ tiu estis mia impresio. Se vi havas alian impreson, vi povos diri ĉi tie.

13 FILMOJ

Je la kvina kaj duono posttagmeze, ni vidis kelkajn filmojn pri antaŭaj hispanaj kaj universalaj kongresoj de Esperanto. Estas samideano kiu ankaŭ estas amatora, — kvazaŭ profesia — filmisto, kaj li kutime filmas la kongresojn kiujn lin li partoprenas. La gesamideanoj povis vidi sin je antaŭaj kongresoj, kio ege amuzigis ilin!

14 HALEA KUNSIDO.

Kelkaj samideanoj diris al mi, ke ili volis partopreni kongreson de HALE, kio tre surprizis min, ĉar oni ne kunvokis ĝin ene de la HEF kongreso, kaj ne estante la prezidanto, Martín Bustín Benito. Tamen, ĉar la pasintan jaron ja estis kunveno de HALE, kaj ĉar ĉeestis la sekretario de HALE kaj la kasisto, kune kun kelkaj aliaj membroj, ni akordis kunveni.

Ano de HALE diris, ke sia adreso estas difektita, kaj li ne ricevis la magazinon. Eble tiu problemo estas pli komuna ol dezirite, tial bonvolu, se vi kiu legas tion ankoraŭ ne havas vian ekzempleron de *Kajeroj el la Sudo*, bonvolu skribi al ni dirante vian novan adreson. Estas multaj magazinoj kiujn la poŝto redonas al ni, kaj ni ne havas la novan adreson. Kion ni faras nun estas

gardi la ekzemplerojn ĝis ni havos la korektajn adresojn.

La ĉeestantoj rezoluciis demandi monon al anoj de HALE por aĉeti skaneron kaj printiklon por plibone eldoni la magazinojn *Kajeroj el la Sudo* kaj *El Correo del Esperanto*. Tamen, ni ne akordis manieron por fari tion, do se vi povas kaj opinias, ke vi devas helpi, vi jam scias nian adreson. :-)

Samideano Ludoviko Oñer proponas, ke *El Correo del Esperanto* havu sian titolon ankaŭ en Esperanto. Kompreneble, tio ne rilatas al HALE, tial ni tradonas la ideon al redaktoro de la revuon.

Alia samideano demandis, kial HALE ne aliĝas al HEF. Oni diris, ke tio jam estos klarigita la antaŭan jaron, kaj ke estis laŭstatuta afero. Sed ĉiel, oni povas aliĝi al SAT kaj samtempe al UEA.

La ĉeestantoj je la kunsido de HALE estis José María Bernabéu, Joaquín Hernández, Giordano Moya, José Luis Pérez Óvilo, José Antonio Cabezas kaj la subskribinto, Jesuo de las Heras.

London la 15-an de julio

15 GRAMATIKA BABILADO.

Estis programita vojaĝo al Malgranda Maro kaj mara ekskurso, kaj la plejmulto el la kongresanoj iris tien. Bedaŭrinde, la redaktoro de ĉi tiu magazino ne havas resumon pri tiu fakto. Sed mi havas pri la alternativo, la GRAMATIKA BABILADO, pri kiu mi resumos nun.

Sed antaŭ tio, okazis **politika afero** rilate al *El Correo del Esperanto*, kiu, kiel vi eble scias, publikiĝas kun la *morala* subteno de HEF, kies nomo es-

tas en la unua paĝo de la magazino. Estis akra sed civiliza diskutado, ĉar estis politika artikolo sur la unua paĝo de la numero de julio, kaj oni diris, ke oni ne povus publikigi tion tiel, ĉar Esperanton oni ne povus rilati al politiko. Post longa debatado en kiu ni aŭdis stultaĵojn kaj saĝaĵojn, ne gravante kiu diris kion, ni konkludis jene:

1. Esperanto ne apartenas al HEF, nek al UEA, nek al neniuj, ĉar Zamenhof jam cedis siajn rajton al tuta homaro. Sekve, iu esperantisto povas uzi Esperanton por tio, kion li volas.
2. La nomo *HEF* kompreneble apartenas al HEF, kaj sekve oni ne povas inkluzivi tiun logotipon kaj samtempe artikolojn kiujn HEF ne aprobas.
3. La numeron de julio de *El Correo del Esperanto* oni povas disvendi kune kun la indiko, ke estis erare inkluzivitaj artikoloj politikaj, sed HEF ne rilatas al politikaj emoj kaj sekve ne aprobas ilian inkluzivon. Aŭ, preferinde, oni ne disvendos la numeron de julio de *El Correo del Esperanto*. Tio estu laŭvole de la redaktoro de la magazino.

Tamen, *El Correo del Esperanto* ankoraŭ estas la plej bona magazino pri Esperanto hispane verkita en Hispanio

Finfine, ni povis komenci nian *grtamatikan babiladon*, kaj mi devas konfesi, ke mi aŭdis verajn majstrojn paroli pri gramatiko tie! Kaj kiam oni ĉeestas je majstrejo, oni nur povas fari tion: prenu krajonon kaj notu.



Krajoj por noti...

Du temojn ni priparolis: la demando pri lia/sia kaj la pasiva voĉo, inkluzive de la tiel nomata *meza voĉo*. Ĉar tiu ĉi raporto ne estas lernolibro kaj jam dikiĝas troe, mi ne inkludos tiujn du gravajn temojn, sed eble en la estonteco mi konvinkos la prelegintojn por ke ili reverkos la temojn por publikigo ĉi tie.

Mardon, la 16^{an} julio 1996

16 PRELEGO EN ESPERANTO

Samideano **Luis Serrano** prelegis pri **For la malriĉeco**. Li diris, ke riĉeco kaj malriĉeco kunvivas en la sama socio, unu apud la alia, kaj la nuna socio faras nenion por rimedi tiun situacion. Li konkludis, ke solvo estas pli proksima ol ni kredas, ĉar malriĉeco ne troviĝas for, sed ene de niaj riĉaj landoj ankaŭ, kaj ke nia socia sistemo kulpas pri tio.

17 HEF ĜENERALA KUNSIDO

Posttagmeze, ni vizitis la enterprenon *Scorpius* en apuda urbeto **Alquerías**, kie loĝas la organizantoj de la Kongreso, kaj post ni vidis grandan magazenojn kaj kion ĝi enhavis, ni kunsidis en granda salono.

La Moŝta Prezidanto de HEF, S-o Antonio Alonso Núñez, salutis kaj enkondukis la diversajn punktojn de la tagordo:

1 *Prezentado, lego kaj eventuala aprobo de la antaŭa kunveno*. Estis problemo ĉar estis redaktita hispanlingve, sed nia prezidanto surprizis nin legante ĝin en Esperanto tamen. Kompreneble, oni

aprobis ĝin.

GRAVA KLARIGO:

Tio ne estas oficiala akto de la Kunveno Jara de HEF, sed *persona resumo* farita de la redaktoro de *Kajeroj el la Sudo*, kiu kompreneble povas enhavi erarojn. Por ekzakto, referu al Libro de Aktoj prizorgita de la sekretario, S^{ro} **Manuel Parra Benito**.

2 *Prezento, studo kaj eventuala aprobo de kontoj de HEF kaj Libroservo*. Oni aprobis tion, ankaŭ.

3 Raporto de aktivaĵoj dum 1995.

4 *Premio Klara Zilbernik*. Kiel ni ĉiuj scias, Klara Zilbernik estis la edzino de L.L. Zamenhof, kiun ŝi apogis dum sia tuta vivo. La Hispana Esperanto Federacio ĉiujare premias virinon por la apogo kiun ŝi donis al sia edzo en lia esperantista aktivado. Ĉi jare la premio estis gajnita de **María Dolores Egea Estañ**, pro la helpo kaj apogo kiu ŝi daŭre donis al sia edzo, **José María Bernabéu Franco**, nuna kasisto de HEF kaj ankaŭ de HALE.

5 *Elektio de du hefanoj por kontroli kontojn*. La asembleo opiniis, ke ne estas bezonata, sekve oni elektis neniu.

6 **Novajo**: a) Informo de advokato pri heredaĵo: mortinta esperanta paro lasis 3.750.000 ptoj. al Fondaĵo Esperanto, sed post pagi al la advokato, restas 3.500.000 pesetojn.

b) ILEI nun estas sub la gvidado de S^{ro} Tarín, de Valencio. La prezidanto de HEF diris, ke *kiel interesiĝulo pri la afero, mi opinias*

ke ĉiu bonvolu prezenti sin al la ekzameno de ILEI. Estas 3 ŝtupoj. Mi plene apogas la opinion de S^{ro} Tarín, ke fakte en niaj vicjoj regas anarĥio. Ĉiu diplomo de ILEI aperos kun subskribo de Universitato, se niaj klopodoj sukcesos.

c) La venonta kongreso okazos en Valencio, kadre de la Eŭropa Kongreso. Post la fino de ĉi tiu Esperanta Kongreso oni povas iri al Santiago de Compostela por partopreni en la unuan Kurson de la Somerkursa Universitato.

d) **Objektantoj**: en Murcia estas la Grupo de Esperanto *Ĉielarko* kiu sole en Hispanio nun havas objektantojn, sed ne sole por Esperanto. Poste ni klarigis, ke la unua fojo kiam Esperanto havis objektantojn laborante por si estis danke al la agado de la Universitata Asocio *Rossetta Ŝtono*, kaj aparte de sia prezidanto, **Pedro Macanás**, kiu estis helpata de anoj de la Grupo de Esperanto *Rikardo Kodornju'*, de Murcia. Bedaŭrinde oni deprivis ambaŭ asociojn de siaj sidlokoj, kaj ili ne plu povis labori pere de objektantoj.

e) **Agado de Eŭropa Parlamento**: oni demandis al 25 parlamentanoj pri Esperanto. Du respondis iom favore. Ĉu li apogas la projekton, aŭ ne, ni ne scias. Estas 70 eŭropaj parlamentanoj kiuj apogas Esperanton en Estrasburgo. Oni ankaŭ klarigis, ke Esperanto estis parolata en la Eŭropa Parlaŭmento dum kvin minutoj.

- f) Grava afero estas nun, ke venontjare oni devas renovigi estraranojn de HEF. Oni devas trovi kandidatojn al prezidanteco, la nuna diris.
- g) Jam estas pretigita la vortaro de Fernando de Diego: 50.000 vortoj kune kun esprimoj apartaj. Ni bezonas monon por ĝin eldoni. Ĉar mankas ankaŭ eta vortaro, estas du proponoj: ĉu reeldoni la *Lexicón-Sopena*, ĉu oni ankaŭ povas eldoni resumon de tiu nova vortaro verkita de F. de Diego. En Valencio aperis grandan stokon de la *Lexicón-Sopena*. Se estas 300 ekzempleroj aŭ pli, ne bezonas reeldoni nun la vortareton.
- h) Pasintjare ni aldonis du postenojn al la estraro de HEF: direktoron kaj vicesekretario, kiujn nia estatuto ne provis. Oni konsentas ŝanĝi la statuton tiurilate.
- i) Doktoro José Luis Pérez Óvilo okazigis, ke la Nobelpremiito D-ro Reinhardt Selten venis en Murcion. Estas grava afero, ke li venis, ke la universitato pagis por ĝi, kaj ke la televida intervjuo kiun oni faris al li estis en Esperanto, ne en la angla, kiel la ĵurnalistoj volis. Restu klare la gratulo pri tiu belega iniciato.



Dr^o Pérez Óvilo, P. Macanás kaj R. Selten

Kaj laste, dankon kaj gratulon al Francisco Miguel Garre kaj la Grupo de Esperanto de Alquerías (Ĉielarko) pro tiu ĉi Kongreso.

Sugestoj kaj proponoj

La Prezidanto mem diris, ke la junaj anoj de HEF petis, ke ili pagu same kiel la aliaj membroj je la lasta kunveno en Salou, por ankaŭ havi la samajn rajtojn. Oni parolis pri la enskribo al *Kontakto*, kiu ĉiu juna HEFano havas senpage, sed oni klarigis, ke estas HEF kiu pagas pro la subskriboj. Finfine, akordiĝis, fari referendumon por ĉu estu rabaton je la kotizo por junaj HEFanoj, kaj ke la estraro de HEF decidus kia rabato estos.

Casanova: mi proponas eldoni *Universalan antologion*, kiu inkluzivas unu frazon en 3500 lingvoj. Ankaŭ elstarajn verkojn de ĉiuj lingvoj en Esperanton. Nun estas dek personoj implikitaj en la projekto.

Prezidanto Alonso deziris koran sukceson al la mirinda verko de Samideano Casanova.

Luis Serrano Pérez: parolis nome de KAE, kaj demandis al la respondeculo pri la mono ĵus akirita de la Fondaĵo Esperanto, ĉar estas multe da mono. Pri tio parolis sinjoro Cabezos:

Juan Antonio Cabezos Martínez: la Fondaĵo enhavis 3.500.000 nun. Tiu mono ne povas elspezi laŭleĝe. Ni nur povas elspezi la interesojn de tiu mono. Sed nur la 70%, kaj la alia 30% devas rekapitaliziĝi aŭ pagi kostojn administrajn.

Denove parolis samideano **Luis Serrano Pérez** kaj petis, ke oni eldonos adresaron de la Hispana Esperanto Federacio. La prezidanto diris, ke ni estas malmultaj. Se gravulo atingus la adresaron, li vidus, ke la nombro estas

malgranda. Tiam Jesuo de las Heras demandis ĉu oni rajtas havi la adresaron, se oni tion petas de la estraro, kaj oni diris al li, ke **laŭ la intenco**. Li respondis, ke *por sendi florojn al la samideanaro!*, sed kompreneble vi, legante, scias nun kial mi demandis tion.

Merkredon la 17^{an} de julio

18 VARMA TEMO: KEA

La Sinjoro Prezidanto informis, ke la Kataluna Esperanto Asocio ne prezentos peton al Universala Esperanto Asocio por esti konsiderata enlanda asocio aliĝinta al UEA, kaj tial la afero multe malvarmiĝis, kaj ankaŭ estas finita afero. Tamen, Sinjoro Pina Tuells demandis pri la kialo de la krizo, kaj oni diris, ke ne povis esti du enlandaj asocioj ene de la sama lando, do se KEA aliĝus tiele al UEA, tiam HEF devus malaliĝi.

[*Sennaciece* parolante, kiel taŭgas en magazino kiel **Kajeroj el la Sudo**, la krizo

neniam devus ekzisti, ĉar se **ni estas kontraŭ nacioj favore al Mondio**, la tuta afero ŝajnas al ni nur *infaneta*.]

Ĉar la afero estis tiel rapide finita, oni proponis daŭrigi la ne ankoraŭ finitan lastan parton de la Kunsido de HEF, ĉar la salono kiun pruntedonis oni al ni hieraŭ devis fermiĝi pli frue ol ni kredis.

19 HEFA KUNSIDO, dua parto

La Prezidanto memorigis nin, ke estas decidite fari referendumon, por ke la tuta HEFano decidu, ĉu sia junularo pagos iomete malpli aŭ ne.

Ankoraŭa temo estis, ke la Kataluna Asocio de Esperanto proponis la ekeston de Kultura Asocio Esperantista. La HEFaro devas esti konsultata.

La ne jam finitan temon pri *krokodili rajte* ĉe nia nacia kongreson denove starigis samideano Serrano Pérez. Estis proponoj pri *spegula kongreso hispane* por nekompetentaj esperantistoj kaj



Luksa kompanio...

kunantoj neesperantistaj, sed finfine oni decidis **referendumi** ankaŭ pri tio, ĉar vidende ĝi estas pli grava afero, ke rabatitaj junaj kotizoj. Jen la demando por decidi referendumo: *Ĉu oni parolos nur esperante en la kongresaj aktoj laŭ la programo?*

Kaj la lasta temo de la kongreso estis pri ***El Correo del Esperanto***, kiu estas eldonita nome de HEF: oni ne devas meti artikolojn pri politiko ekde nun.

20 KONGRESA KURSO

Dum la kongreso estis kurso baza de Esperanto, gvidata de S^{ro} José Pina Tuells. Sep kursanoj estis.

21 LIBROSERVO

Dum la tuta Kongreso estis libroservo, kie oni vendis nian literaturon por valoro de ĉirkaŭ 70.000 pesetoj.

22 KONGRESA BANKEDO FINA

Laŭ la programo, la lasta akto de la Kongreso estas la Oficiala Bankedo, kiu fakte estis *bankeda kunveno*. Mi havis luksan kunantaron: la organizinton de la kongreso kaj lia edzino, la nepinon de S^o Rikardo Kodorniu, la prezidanton de HEF, kaj la redaktoro de ***El Correo del Esperanto***. Ni private malfuŝis la mondon, sed la viando certe ne estis plibonigebla! Finfine ni devis *ĝisrevidi*..., ĝis Valencio 97!

...Venas el paĝo 4.

Kamaradino **Jo van Hulst** informis pri kunveno inter SAT-membroj kiu okazos dum la FAULHABER semajnfino de la 4^a ĝis la 6^a de oktobro de 1996 en la konferencjo Mennorodo en Elspeet.

La LEA-komitato havis interesajn kontaktojn kun **Jacques Schram** el Antverpeno, kaj konsciis ke li havas la kapablecon starigi la SAT-grupon.

LEA en Italio. Ĝus antaŭ la kongreso la LEA komitato ricevis leteron de tiu nova asocio kiu informas pri la baldaŭan oficialan agnoskon de la Gotenburga Konvencio, dum la ĝenerala kunveno de siaj membroj en aŭtuno 1996.

Ĉe la fino de la kunveno ĉiuj akordiĝis por helpi SATon en la reeldono de ***Ple-na Vortaro***. Tri kvaronoj el la enkasa mono estos prunte donitaj.

Tutkoraj salutojn,

Guy Cavalier,
Sekretario de la LEA komitato.



Post poemoj, ni kantis Sub la signo de l' Espero.

MANIFIESTO DE PRAGA

81° CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO, PRAGA.

2.972 congresistas - 66 países - 185 sesiones especializadas - 1 lengua

Nosotros, miembros del Movimiento mundial por el progreso del Esperanto,

dirigimos este manifiesto a todos los gobiernos, organizaciones internacionales y hombres interesados por la Humanidad,

declaramos nuestra intención de trabajar firmemente por alcanzar los fines aquí expuestos,

e invitamos a todas organizaciones y personas a que colaboren con nuestro proyecto.

Presentado en 1887 como proyecto de lengua auxiliar para la comunicación internacional, el Esperanto trabaja desde hace más de un siglo por unir a los hombres más allá de las barreras culturales y lingüísticas. Durante este tiempo, las aspiraciones de sus hablantes no han perdido ni importancia ni actualidad. Ni el uso mundial de algunas lenguas nacionales, ni el desarrollo de las técnicas de comunicación, ni el descubrimiento de nuevos métodos de enseñanza de lenguas, podrán llevar a la práctica los siguientes principios que consideramos esenciales para un orden lingüístico justo y eficaz.

1. Democracia. Un sistema de comunicación que privilegia totalmente a unos hombres, pero que exige a todos los demás que inviertan años de esfuerzo para lograr un bajo nivel de dominio de la lengua, es fundamentalmente antidemocrático. Aunque el Esperanto no es perfecto, como ocurre al resto de lenguas, sí es muy superior a cualquier otro rival en el campo de la comunicación mundial en igualdad.

Afirmamos que la desigualdad lingüística genera desigualdad de comunicación en todos los órdenes de la vida, así como a nivel internacional. Nosotros constituimos un Movimiento para la comunicación democrática.

2. Educación transnacional. Toda lengua étnica está ligada a una cultura y nación/es concretas. Así, el alumno que estudia inglés aprende cultura, geografía y política de los países anglófonos, en especial de USA y Reino Unido. El estudiante que estudia Esperanto se informa de un mundo sin fronteras, en el que cada país se ofrece como hogar.

Afirmamos que la enseñanza de cualquier lengua étnica extranjera en la educación está ligada a una determinada perspectiva sobre el mundo. Nosotros constituimos un Movimiento para la educación transnacional.

3. Eficacia pedagógica. Tan sólo un muy pequeño porcentaje de quienes estudian una lengua extranjera llegan a dominarla. El dominio pleno del Esperanto es posible incluso de manera autodidacta. Diferentes estudios confirman su el valor propedéutico para el estudio de otras lenguas. Se recomienda, asimismo, como elemento primordial para el conocimiento lingüístico de los alumnos.

Afirmamos que la dificultad de las lenguas étnicas siempre será un obstáculo para numerosos estudiantes

que, sin embargo, podrían beneficiarse del conocimiento de una segunda lengua. Nosotros constituimos un Movimiento para la enseñanza eficaz de lenguas.

4. Plurilingüismo. LA Comunidad-Esperanto es una de las pocas comunidades lingüísticas a escala mundial cuyos hablantes dominan sin excepción dos o más lenguas. Todos sus miembros han aceptado aprender al menos una lengua extranjera. Esto conduce, en numerosas ocasiones, al conocimiento y al amor por numerosas lenguas y en general a un horizonte personal mucho más amplio.

Afirmamos que los miembros de todas las lenguas, grandes y pequeñas, deberían disponer de una mayor oportunidad para alcanzar un alto nivel de comunicación en una segunda lengua. Nosotros constituimos un Movimiento que proporciona esta posibilidad.

5. Derechos lingüísticos. El reparto desigual de poder entre las lenguas es motivo de permanente inseguridad lingüística y de un evidente sometimiento lingüístico en gran parte de la población mundial. En la Comunidad-Esperanto, los miembros de lenguas grandes y pequeñas, oficiales y no oficiales, se reúnen en terreno neutral, gracias a un compromiso libre y recíproco. Este equilibrio entre derechos lingüísticos y responsabilidad constituye un precedente idóneo para desarrollar y valorar otras soluciones a la desigualdad lingüística y los conflictos lingüísticos.

Afirmamos que las enormes desigualdades de poder entre las lenguas conculcan las garantías expresadas en todos los documentos internacionales respecto al tratamiento igualitario sin distinción por razones de lengua. Nosotros constituimos un Movimiento en favor de los derechos de todas las lenguas.

6. Diversidad lingüística. Los gobiernos nacionales tienden a considerar la gran diversidad de lenguas en el mundo como una barrera para la comunicación y el desarrollo. Para la Comunidad-Esperanto, sin embargo, la diversidad lingüística es fuente permanente e imprescindible de riqueza. Consecuentemente, toda lengua, como toda especie viva, encierra un valor en sí misma y es digna de protección y apoyo.

Afirmamos que la política de comunicación y desarrollo, si no está basada en el respeto y apoyo a todas las lenguas, condena a muerte inexorablemente a la mayoría de las lenguas del mundo. Nosotros constituimos un Movimiento en favor de la diversidad de lenguas.

7. Emancipación del hombre. Toda lengua libera y limita a sus miembros, ofreciéndoles la posibilidad de comunicarse entre sí, a la vez que les impide comunicarse con todos los demás. Planificado como instrumento universal, el Esperanto es uno de los grandes proyectos en que trabajan por la emancipación del hombre. Proyecto que posibilita a todo hombre participar como individuo en la comunidad humana, permitiéndole mantener firmes raíces en su propia identidad cultural y lingüística, pero sin limitarlos.

Daŭrigas en paĝo 44^a

LA TAJFOREGNO DE MURCIA-III,

El *Lirikaĵ perloj de Al-Andalus*,

de Antonio Marco Botella

Li (Ibn Arabi) resumas siajn ideojn per jenaj versoj:

Vere, nur ekzistas Dio.

Ekster Li nenio restas.

Nur ekzistas lia volo

kaj eksprimoj diesencaj.

Ĉio, kio en l' ekzisto

nun montrigas kaj aŭtentas

estas Di', esprimo sola,

kiu al Li apartenas;

havas homan karakteron

tio, kio ŝajnaspektas.

La ekzistado de pluraj religioj li eksplikas montrante absolutan indiferenton al tiuj formoj ekzistantaj, ĉar laŭ li, kompleta kaj perfekta manifestiĝo de Dio nur estas tiu, kiun Li mem komunikas al mistikaj animoj. Tial, la Dio de mistikuloj ĉiam estas la sama, sen la karakterizoj kiuj diferencigas la diversajn religiojn. Tiusence li tiel poezias¹:

*Mia kor' akceptas formojn
kaj karakteriz-plurecon:
por gazeloj, herbokampo;
por monajoh, rifuĝejoj;
ankaŭ temploj por idoloj
kaj Kaab' por pilgrimceloj;
ĝi akceptas Koran-libron
kaj de Tora la tabelojn...
Sekvas mi am-religion,*

kien iras la kameloj.

Amo estas mia fido,

Amo estas mia kredo.

Ibn Arabi, mistika poeto antaŭ ĉio, verkis du kolektojn da poemoj. Unu, *Turjuman*, jam priparolita, kaj alia *Divano* —kolekto da poemoj—, versoj mistikaj, por kies verkado li uzis ĉiujn elementojn tradiciajn en la araba poezio. Ekzemple, li tre ofte uzas en tradician scenejon de la beduenoj: la dezerto. La celo estas ĉiam esprimi ideon pri provizoraj kampado kaj foriro, pri angora soleco kaj atendo, aŭ pri nostalgio kaj reveno. Poste oni muntas poemon kiel la jenan:

*Dum foresto nostalgio
amarigas min, elĉerpas,
sed vin trovi ne kalmigas
nek ĝojigas min amplenan,
ĉe forest' prezenc' signifas
nostalgion vivosentan.
Retroviĝ' neatendita
estas ja dolor' kruela,
ĉar rimedo al pasio
ĉiam estas nekompensa,*

*temas pri vizi' revata,
kiun la real' superas.
Unuiĝo kaj majesto
vian belon pliakcentas,
ne ekzistas iu homo
kies ampasi' ne kreskas
rigardante harmonion
de l' beleco via hela!*

Daŭrigota...

¹Ĉi tiun poemon mi legis ĉe la malfermo de la Internacia Kongreso pri Ibn-Arabi, kiu okazis en Murcio la pasintan 21-an de oktobron de 1996, kiun ĉeestis espertoj el la

Kajeroj _____ _____ el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,**
E30080 MURCIA,
HISPANIO

Venas el paĝo 42^a

Afirmamos que el uso exclusivo de lenguas nacionales levanta inevitablemente insalvables barreras a la libertad de expresión, comunicación y asociación. Nosotros constituimos un Movimiento en favor de la emancipación del hombre.

RESOLUCIÓN DEL CONGRESO

El 81º Congreso Universal de Esperanto,
celebrado del 20 al 27 de julio de 1996 en Praga, República Checa, con la participación de 2.972 congresistas pertenecientes a 66 países,

atendiendo a los debates y recomendaciones de los expertos de las Naciones Unidas, UNESCO, Parlamento de Europa y de otras organizaciones internacionales, en el marco del Simposio-Nitobe de las Organizaciones Internacionales sobre “Una Lengua para la paz y la democracia intencionales”,

constatando la importancia de los principios expresados en el Manifiesto de Praga,

confirma la urgente necesidad de un amplio debate mundial sobre los derechos lingüísticos del hombre, la igualdad lingüística y la necesidad de una comunicación eficaz y de alta calidad más allá de las barreras lingüísticas,

enfatisa que el Movimiento-Esperanto ya ha alcanzado suficientes éxitos en todos estos campos, mereciendo un estudio serio y profundo por parte de las instancias y especialistas en política lingüística,

e invita a todas las organizaciones internacionales e instancias de política lingüística a una colaboración estrecha con el Movimiento-Esperanto para la construcción de un orden lingüístico más justo y democrático.

Depósito legal: MU-798-1996
Presejo: Anka Ĉus'



*Banĝisto, same kiel dancisto
ankaŭ estas laboristo!*